


l'espéranto



la langue de l'amitié
sans frontières



esperanto



la lingvo de l'amikeco
sen landlimoj

Ils ont participé au 47^{ème} Congrès des Jeunes Espérantophones ...

ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale
ESPERANTO
regroupant
les départements
Meurthe-et-Moselle (54)
Meuse (55)
Moselle (57)
Bas-Rhin (67)
Haut-Rhin (68)
Vosges (88)

Maison des Jeunes
et de la Culture
« Philippe Desforges »
27, Rue de la République
FR-54000 NANCY

ABONNEMENT / ABONO
annuel / jara
14 €
eksterlando
18 €



Comme chaque année,
non loin de leurs aînés
réunis dans la capitale
cubaine pour les assises du
**95^{ème} Congrès Universel
de UEA**, 35 garçons et
filles tout aussi passionnés,
ont attesté à leur façon du
dynamisme permanent de la
langue internationale.

De multiples activités se
sont déroulées avec la
participation bénévole de 9
adultes de 9 pays... et de 3
continents !



photo A. Grossmann

Une séquence émouvante inoubliable ... la montée sur la podium, dans la salle du *grand congrès*, du groupe des jeunes choristes, heureux de dédier à tous les participants, en guise de remerciement, un chant de circonstance, en espéranto bien sûr !

Le prochain "*congrès des enfants*" aura lieu à Hundested au Danemark, du 23 au 30 juillet 2011, dans un centre de vacances en bordure de mer, à 70km de Copenhague où se tiendra à la même date, le 96^{ème} Congrès de UEA.

Les parents intéressés pourront d'ores et déjà consulter un site fort documenté, où toutes informations utiles sont déjà en place, texte et photos, une motivation suffisante pour initier un cours d'espéranto aux futurs jeunes congressistes !

Une adresse à contacter: bertosch.free.fr/iik2011

Espéranto France-Est	esperanto France-Est	Orient-Franca Esperanto-Asocio.
La Informilo	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale ESPERANTO	Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo ESPERANTO
Rédaction: Redaktoro:	PoI DENIS, 5, Chemin de Blamecourt, 55000 BAR LE DUC	
	poŝ-tel. 06 98 09 62 81	pol.denis@orange.fr
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit Texte envoyé par courriel Document avec mise en page	un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.		

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	telefono	Ret-adresoj
Prezidanto + PKK <i>Président + Cours par correspondance</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE	03.89.82.37.62	kueny.robert@neuf.fr
Vic-sekretario <i>Vic-secrétaire</i>	S-ro Jacques HERLÉ 1, chemin du Berger 57380 MAINVILLERS	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
Kasisto <i>Trésorier</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	03.89.45.62.89	andreo.ag08@free.fr
Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANOEUVRE	03.83.53.57.54	thibias.jean-luc@wanadoo.fr libroservo.efe@wanadoo.fr
Redaktoro <i>Rédacteur</i>	S-ro PoI DENIS 5, Chemin de Blamecourt 55000 BAR LE DUC	06.98.09.62.81	pol.denis@orange.fr
Aliaj komitatanoj	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36	liliber54@yahoo.fr
<i>Assesseurs</i>	S-ro Frédéric PORRETTI	03.69.77.07.24 06.15.70.15.73	popo68@evhr.net
	S-ro Roger DEGRELLE	03.82.21.92.40	roger.degrelle@wanadoo.fr
	S-ino Simone KIRY	03.89.57.68.10	jeanmarie.kiry@sfr.fr
	S-ro Cyrille HURSTEL	08.70.57.68.00	cyrille.hurstel@free.fr
	S-ino Ginette MARTIN	03.29.24.68.46	gimavo@wanadoo.fr
	S-ino Mireille ANTONI-TURCK	06 34 33 68 93	mirantur@hotmail.com
	S-ro Bertrand WICK	03.89.69.16.63	bertrand.wick@wanadoo.fr
	S-ro Alian Collignon	03.83.40.35.60	colli.alano54@orange.fr

Abono al La Informilo →	Francio: 14 eŭroj Eksterlando: 18 eŭroj	← Abonnement à La Informilo
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	Esperanto France-Est	← Paiement par chèque au nom de
Pagoj per ĝiro al jena konto →	CCP 1997 72 W NANCY	← Paiement par virement au compte
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier

Sommaire 151

1 page frontale	21 IF Nördlingen
2 ours	22 Agay - Sète
3 éditorial	23 félicitations
4 stage régional	24 citations
5 / 6 adhésion Copenhague	25 nouveau parti
7 / 8 / 9 Congrès Cuba	26 sous la pluie
10 / 11 ILEI	27 Cyril et Roz'
12 / 13 post-congrès	28 libroservo
14 / 15 IJK	29 anecdotes
16 / 17 Congrès asiatique	30 page trésorier
18 / 19 Plouezec	31 page détente
20 Bona Espero	32 photothèque

ISSN 0291 6037 trimestriel

bulletin d'information bilingue sur l'espéranto
édité par l'association culturelle**Esperanto France-Est**MJC Philippe Desforges – 27 rue de la République
FR - 54000 NANCYDirecteur de la publication : **Edmond LUDWIG**Rédacteur : **PoI DENIS**dépôt légal : **30 septembre 2010**imprimé par l'Office Central de Coopération à l'Ecole
Place de l' Ecole Normale, FR - 55000 BAR-le-DUCN° CPPAP : **0409 G 83517**



Karaj gefederacianoj !

Nur mallonge ĉi-foje ! Vi certe memoras, ke mi ege deziris, ke ĉi-jare nia Ĝenerala Kunveno okazu en Strasburgo. Mi deziris tion, ĉar mi eksciis, ke la tiea grupo organizas Esperanto-semajnon, kiu ebligas malkovron de multfaceta ESPERANTO en diversaj kvartaloj de la urbo. Do, se via grupo havas saman dinamikon, ne hezitu imiti iamaniere la strasburganojn kaj raportu kaj sur via retejo, kaj sur la retejo kaj en LA INFORMILO .

Mi deziras sukceson al viaj klopodoj !

Edmond LUDWIG

pour vous initier à la seule
vraie langue
internationale, pour vous perfectionner
ou éprouver le plaisir rare de converser
en espéranto...



→ nos stages, nos congrès,
nos rencontres, nos voyages...



à noter sur votre éphéméride ...

- 1 - Internacia Festivalo - NÖRDLINGEN
27 déc. / 3 janvier 2011
- 2 - Mediteranea Esperanto-Semajno - AGAY
26 février / 5 mars 2011
- 3 - 69^a Regiona Staĝo d' Espéranto France-Est - BAN-sur-MEURTHE-CLEFCY
1 / 3 avril 2011
- 4 - INTERASOCIA RENKONTIĜO - SETE
22 / 26 avril 2011
- 5 - Universala Kongreso de UEA - COPENHAGUE
23 / 30 juillet 2011

espéranto
France-Est

Ni rememorigas al vi la retejon de nia asocio Esperanto France-Est

<http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr>

Krome eblas ankaŭ atingi ĝin per

<http://esperanto.france.est.free.fr>

Vi estos informitaj ne nur pri la vivo de nia asocio sed ankaŭ pri aktivaĵoj de la lokaj grupoj, de unuopuloj
... kaj pri Esperanto ĝenerale !

Multaj ligoj ebligas al vi trovi aliajn interesajn retejojn en Francio kaj en la mondo
La nova rubriko "nos albums photos" revivigas okultrafe regionajn eventojn... kaj alilokajn !
indas ofta vizito !

apprendre
l'espéranto

rapidité ...
efficacité ...

- ★ un matériel adapté
- ★ une technique éprouvée
- ★ un réseau d'animateurs compétents
- ★ un savoir immédiatement opérationnel

"☆☆☆ ?...
-☆☆☆☆!"

deux maîtres-mots
de notre cours
par correspondance !...



Edmond LUDWIG
26, route de la Schlucht
68140 STOSSWIHR
03 89 77 52 55

une diffusion
sur toute la région
...et au-delà !



chez soi !

La 69a regiona **esperanto** staĝo de *France-Est*

**Okazos en la proksimeco de Fraize
en la Vogezoj
en la Domo Le Vic
88230 Ban-sur-Meurthe-Clefcy
de 1a ĝis 3a de Aprilo 2011**



Kiel honoran gaston kaj preleganton de nia printempa staĝo ESPERANTO France-Est invitos Bardhyl SELIMI el Albanio

Iuj inter vi, kiuj kutimis aŭskulti eksterlandajn radio-elsendojn per la mallongaj ondoj, certe de tempo al tempo ankaŭ trafis elsenderon de Radio TIRANA kun la plurhoraj paroladoj de la tiama diktatoro Enver HOXHA (Enver Hoĝa). Dume suferis liaj popoloj, en lando fermita al la ekstera mondo.

Nia albana samideano Bardhyl SELIMI, kies subskribon konas la legantoj de pluraj famaj Esperanto-gazetoj, gvidos la seminarion de la printempa staĝo de Esperanto France-est en la restadejo Les amis du Vic.



Mapo el Vikipedio

Kiu estas Bardhyl SELIMI

Mi estas naskiĝinta en aŭgusto 1945 en Kosovo, kelkmonate post la fino de la milito. Unujara, mi kaj mia patrino Vezire, fuĝis al Albanio, al Tirana, ĉar la novaj komunistaj regantoj mistraktis nin (oni eĉ enprizonigis mian patrino kaj min trisemajne) pro la fakto ke la patro Adem kontraŭstarigis armile la novan reĝimon slavoserban. Patro fuĝis samtempe al Grekio, de kie post kvar jaroj li eskapis al Okcidenta Germanio, kaj poste al Aŭstralio. La patro estis diplomito pri agrara inĝenierado en Zagrebo, pro tio li trovis laborpostenojn prestiĝajn en scienca instituto, kie li deĵoris, ĝis li pensiigis.

Dume la patrino, instruistino, estis denove arestita post unu jaro de la komunista reĝimo de Tirana kaj enkarcerigita naŭ monatojn, akusite pro kontraŭkomunisma agado, sed tio ne pruviĝis, kaj oni finfine liberigis ŝin. En tiaj kondiĉoj, ne sciante ion pri la sorto de sia edzo, ŝi decidis reedziniĝi, certigante mian familion kompleta.

La patro, sciiginte pri ŝia decido, reedziĝis en Germanio kaj kreis en Aŭstralio novan familion. Tiel miaj gepatroj spertis similan sorton al miloj da albanaj familioj tiutempe. Mi renkontis la patron nur somere 1990, en Romo, kiam la ŝtato liveris unuafoje pasportojn por albanoj. La patro mortis en 2001, dum la patrino ankoraŭ feliĉe vivas.

Mi finstudis matematikon en la universitato de Tirana kaj instruis ĉi-fakon ok jarojn poste en Universitato, samtempe kun filozofio, mia dua fako. Sed sciiginte pri mia vera deveno, la komunisma reĝimo en Tirana malpermesis min pluinstrui en universitato. Tiel mi laboris kiel mekanikisto dum pli ol tri jaroj. Poste oni dungis min denove kiel instruiston en la kamparo for de la hejmo. En la jaro 1991 mi returniĝis al la urbo, kie mi pluinstruis matematikon al mezlernejanoj ĝis mia pensiigo en la jaro 2007.

Esperanton mi ekkonis decembre 1961 okaze de spontanea lernokurso, tiutempe en la kulturdomo. Ekde tiam mi pasiigis pri tiu mirinda internacia komunikilo, kvankam ni



loj, propaganda diversforma eldonado, ni sukcesis alligi ankaŭ nian malgrandan landon al la tutmonda esperantista movado. Menciindas nia klopodo por instigi niajn studentojn plustudi en aliternejo per Esperanto ĉe ISTK Bydgoszcz, kaj AIS San-Marino, kie fakte bakalaŭriĝis kelkdekoj da studentoj kaj magistriĝis eĉ du el ili. En iliaj finaj diplom-laboraĵoj niaj studentoj prezentis faktojn el la albana kulturo, historio, turismo. Mi konservas kopiojn de tiuj verkaĵoj en mia komputilo.

Mi kompilis kaj eldonis propran lernolibron de Esperanto en la jaro 2001 (ekzistis du aliaj antaŭ mia lernolibro, de samideanoj Zef Mjeda kaj Vasil Pistoli).

Ekde la jaro 1996 mi komencis partopreni internaciajn aktivecojn pri Esperanto en Kroatio, Italio, Rumanio, Bulgario, Nederlando.

Dum miaj vojaĝoj mi prelegis pri mia lando, publikigis artikolojn en La Gazeto, Esperanto, Monato, Bazaro, Zagreba Esperantisto k.a.

Mi loĝas kun mia edzino en Tirana, dum miaj du filoj finstudintaj en Italio pri elektronika inĝenierado kaj internacia financo trovis laboron tie.

ALIGILO

KOPENHAGO

96-a UNIVERSALA
KONGRESO
DE ESPERANTO
23-30 julio 2011
Kopenhago, Danio

Kongresa numero:

Konstanta adreso:
96-a UK de Esperanto
Nieuwe Binnenweg 176
NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando
www.uea.org (ebblas aligi ankau rete)

ĈIU ALIGANTO UZU APARTAN ALIGILON, FOTOKOPIION AŬ SAMFORMATAN PAPERON - BONVOLLU
TAPI AŬ SKRIBI PRESITERE. LABEZONE METU KRUCON EN LA KONCERNALJN KVADRATETOJN.

FAMILIA NOMO

(por aligeba ordigo)

VIRO/VIRINO

(porstaka la nevalidan)

PERSONAL(J) NOMO(J)

UEA-KODO

ADRESO (raclingve en latinaj literoj kun postkodo)

LANDO

TEL. (kun prefikso)

NASKIGDATO

RETADRESO

Mi aligas al la Kongreso laŭ la kondiĉoj presitaj sur la dorsa flanko. (Aligojn sen kotizpago oni ne traktas.)

Mi sendas ĉi tiun aligon al mia landa peranto kaj samtempe pagas al tiu (vidu dorso sube).

Mi sendas ĉi tiun aligon al la CO en Roterdamo kaj pagas laŭ suba specifo.

al ABN-Amro-konto n-ro 42.69.01.444 en la nomo de la UK (aldonante 7 eŭrojn), IBAN-kodo: NL86ABNA0426901444, SWIFT(BIC)-kodo: ABNANL2A.

al ING-konto n-ro 627337 (aldonante 7 eŭrojn, por nederlandanoj sen kosoj); el EU-landoj, IBAN-kodo: NL91INGB0000627337, BIC-kodo: INGBNL2A (sen kosoj).

per ĉeko favore al UK de Esperanto (aldonante 20 eŭrojn).

per Visa/Amex/Mastercard n-ro

Visa-kaj Mastercard-kontrolnumero (tri ciferoj, dorso de la karto)

al la poŝtekkonto de UEA en

Germanio 3182 91 509 BLZ 370 109 50 K&In; Svedio 74374-0; Svislando 12-2310-0).

per PayPal (interreta pagsistemo; al <financoj@co.uea.org>).

bonvolu debeti al mia UEA-konto, kie estas surŝta bonaĵo.

Bv. avertigi en la Kongresa Libro mian retadreson anstataŭ mia poŝta adreso.

Mi ne volas ke adreso mia, poŝta aŭ reta, aperu en la Kongresa Libro.

Se vi aligas kiel kunulo, bv. ĉi tie indiki la nomon/kodon de la ĉefaliginto:

Se vi aligas senpage, bv. skribi ĉi tie la kialon (vidu dorso):

Mi legis, komprenas kaj akceptas la kondiĉojn presitajn dorsflanke sur ĉi tiu aligilo.

DATO

SUBSKRIBO

Por uzo de la administracio/peranto:

UEA-membro en kategoriojuro

UEA-spezĉilio n-ro:

konfirmo de peranto:

PAGO EN CO

KONFIRMO

notoj

KOTIZO (vidu dorso)	DONACO AL KONGRESO
BLINDULA KASO	INFANA KONGRESETO
FONDAĴO CANUTO	TRIAMONDA FONDAĴO
KOSTOJ (7 aŭ 20 eŭroj)	ENTUTE (en eŭroj)

Résolution du 95^{ème} Congrès Mondial d' Espéranto

Le 95^{ème} Congrès Mondial d' Espéranto, qui a réuni à La Havane (Cuba) 1002 participants de 59 pays,

Considérant que les Nations Unies ont déclaré l'année 2010 Année Internationale du Rapprochement des Cultures,

Constate :

--- que la diversité des cultures dans le monde constitue une contribution importante à la richesse de l'humanité ;

--- qu'il y a déjà 123 ans que l' Espéranto, en tant que langue neutre, aide à ériger des ponts entre les peuples et les cultures ;

--- que les Congrès Mondiaux d' Espéranto, en rassemblant des hommes venus de pays les plus divers de par le monde, apportent par eux-mêmes le témoignage de cette aptitude à réaliser ces ponts ;

Proclame la volonté des espérantophones de réaliser une action commune avec les Nations Unies et l' Unesco afin de promouvoir la compréhension entre les peuples tout en préservant l'identité de tous les groupes humains ;

Et invite les Nations Unies et l' Unesco à faire jouer à plein leurs relations avec l' Association Mondiale d' Espéranto afin de réaliser de la manière la plus efficace leurs objectifs.

La kotizoj varias depende de la loĝlando de la aliĝanto, laŭ la jena grupo:

A: Ĉiuj landoj escepte de tiuj de kategorio B.

B: Ĝiaj socialismaj landoj de Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Resp.), Afriko kaj Latina Ameriko.

La kotizoj estas pagendaj al la konstanta adreso aŭ al landa peranto (vidu liston en la Unua Bulteno, aŭ en la reto ĉe www.uea.org/kongreso/ak-perantoj.html; ankaŭ pluraj aliaj informoj pri la Kongreso aperas en la UEA-paĝoj). La CO en Roterdamo akceptas aliĝilojn ĝis la 15-a de junio 2011. Post tiam, oni aliĝu surloke dum la UK.

POR ELEKTI LA ĜUSTAN KOTIZON BV. ATENTE LEGI LA ĈI-PAGAJN KLARIGOJN.

KONGRESKOTIZOJ VALDAJ: (ĉiuj en eŭroj)	ĝis 31 dec. 10 1-a periodo		ĝis 31 marto 11 2-a periodo		ĝis 1 aprilo 11 3-a periodo	
	A	B	A	B	A	B
Aliĝkategorio						
1. individua membro de UEA (ne inkluzivas MG):	160	120	200	150	240	180
2. ne individua membro de UEA	200	150	250	185	300	225
3. komitato/kunulo/junulo/handikapulo, mem individua membro de UEA	80	60	100	75	120	90
4. kunulo/junulo/handikapulo, ne individua membro de UEA	120	90	150	110	180	135

DEFINOJ

Individua membro de UEA: Dumviva Membro (DM aŭ DMJ), Membro kun Jarlibro (MJ aŭ MJ-T), Membro-Abonanto (MA aŭ MA-T). *Ne temas pri Aliĝitaj Membroj kaj ne inkluzivas Membrojn kun Gvidlibro (MG).*

Komitato: Tiu, kiu estas membro aŭ observanto en la Komitato de UEA en la momento de aliĝo.

Kunulo: Tiu, kiu loĝas samadrese kun la ĉefaliĝinto. Ĉefaliĝinto oni konsideras personon, kiu pagas kotizon en kategorio 1 aŭ 2.

Junulo: Tiu, kiu naskiĝis inter 81 01 01 kaj 90 12 31 (inkluzive). Oni ne prete noti la naskiĝdaton sur la aliĝilo.

Handikapulo: Tiu, kies handikapo nepre postulas akompananton (ekzemple blindulo), kaj kiu pruvus tion per kuracista aŭ simila atestilo, kiu klare indikas la tipon de handikapo.

Senpage aliĝas:

- infanoj kaj gejunuloj naskiĝintaj post 90 12 31;
- nemalhaveblaj akompanantoj de handikapuloj.

La kotizo ne estas repagebla, senkonsidere ĉu la aliĝinto ne povas partopreni la Kongreson pro propra volo aŭ pro iu ajn ekstera kaŭzo, eĉ se la Kongreso ne okazas, aŭ okazas en alia urbo.

La kotizo ne inkluzivas loĝadon, ekskursojn, bankedon kaj eventualaj aliajn aparte pagendajn aferojn pri kiuj informoj kaj mendiloj aperas en la Dua Bulteno. La kotizo inkluzivas nenian asekuron. Kongresneco ne estas transdonebla al alia persono.

Por la limdatoj kaj aliaj kondiĉoj validas la dato de ricevo de la pago en la CO aŭ ĉe peranto. Aliĝilon sen kompleta pago oni ne traktos.

Kongresa Regularo (ekstrakto): "8. Kongresanoj devas fari nenton, kio kontraŭas la Kongresan Regularon, aŭ malutilas al la UK, kaj devas submetiĝi al la leĝoj de la lando, kie okazas la UK."

Kiu subskribas ĉi tiun aliĝilon, konfirmas sian respekton al la Kongresa Regularo kaj la laŭstatuta neŭtraleco de UEA, kiu organizas kaj aŭspicias la Universalaĵn Kongresojn.

**! Se vi pagas al peranto, bonvolu sendi ankaŭ la aliĝilon al tiu.
Se vi pagas rekte al konto de UEA, sendu la aliĝilon al Roterdamo.**

Rezolucio de la 95a Universala Kongreso de Esperanto

La 95a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Havano (Kubo) kun 1001 partoprenantoj el 59 landoj,

Konsiderante, ke Unuiĝintaj Nacioj deklaris la jaron 2010 jaro de interproksimigo de kulturoj,

konstatas

-- ke la diverseco de kulturoj en la mondo grave kontribuas al la riĉeco de la homaro,

-- ke jam dum 123 jaroj Esperanto kiel neŭtrala lingvo helpas konstrui pontojn inter popoloj kaj kulturoj, kaj

-- ke la Universalaj Kongresoj de Esperanto, kunigante homojn el plej diversaj landoj tra la mondo, mem atestas tiun kapablon konstrui pontojn,

Deklaras la deziron de Esperanto-parolantoj kunagi kun Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko por stimuli komprenemon inter popoloj kaj samtempe protekti la identecon de ĉiuj homgrupoj, kaj

invitas Unuiĝintajn Naciojn kaj Uneskon plene eluzi siajn rilatojn kun Universala Esperanto-Asocio por plej efike realigi siajn celojn.

**KVAR ESPERANTO-EVENTOJ EN KUBO
EN JULIO 2010**

En ĉi-tiu numero aperas raportoj pri Esperanto-eventoj en Kubo. Ĉi-sube la impresoj de Liba Gabalda, kiu pasigis tie 3 semajnojn kaj ankaŭ raportas pri la UK en Havano. Ni dankas al ŝi.

Kubaj esperantistoj havis ĉi-jare tre varman sezonon. Krom vere varmega vetero ili ŝvitis ankaŭ pro la organizado de kvar Esperanto-eventoj, kiuj tie okazis somere. En la bela feriejo "Cáñimao" proksime al la urbo Matanzas okazis por-instruista ILEI konferenco kaj seminario.

La sekvan semajnon oni ĝuis la 95-an Universalan Kongreson en la ĉefurbo Havano kaj samtempe okazis, ankaŭ en Havano, la 41-a Infan-junula Kongreseto en hotelo "Acuario".

La lastan semajnon de julio la gejunuloj havis sian 66-an Junularan Kongreson en la bela ripozloko "Villa Trópico" en la regiono de Matanzas.

La eventoj malsimilis unu al la alia, sed pluraj aferoj estis komunaj: senproblema interkompreniĝo, plezuro lerni, interŝanĝi ideojn, spertojn, motivado al poresperanta agado, ĝojo renkonti gekonatojn kaj krei novajn amikecojn.

Mia edzo Floreal kaj mi ĝuis tri el tiuj-ĉi eventoj. Mi povas nur pozitive paroli pri ili. La etoso estis gaja kiel la kuba popolo. La riĉenhavaj programoj abundis en ĉiuj eventoj. Altkvalitaj prelegoj alportis pliajn sciojn. En intensaj kursoj oni plu lernis kaj vesperaj artaj programeroj pliriĉigis nian kulturen horizonton. Kongresaj ekskursoj gvidis nin al interesaj kaj admirinde belaj lokoj de Kubo.

Ni havas belajn rememorojn kaj pozitivajn impresojn de tiuj-ĉi internaciaj renkontiĝoj. Kubo postlasis en ni la deziron de baldaŭa reveno.

Liba Gabalda



Malnova kvartalo de Havano - Neptuno, kune kun fortikaĵo El Morro gardas la urbon



Malnova kvartalo de Havano - Nacia Kapitulo



HabanaBusTour - oportuna transporto por turistoj (kun 5 CUC senlima tuttaga bileto)



Fotoj: Maki Sano

Neniu komerca reklamo sed troviĝas multaj murpentraĵoj pri revolucio kaj kunlaboro.

Kubo per bildoj

Hotelĉambristinoj tre arte kapablas faldi la bantukojn en la ĉambro de la klientoj. Jen kion skribas klientino:

Dankon kara hotelservistino, por krei ĉarmajn bantuk-artaĵojn kaj bonkorajn salut-notojn ĉiutage, sed ĉu vi unue povas ripari la klimatizilon kaj la fridujon en mia ĉambro...?

Jes, abundas artistoj sed mankas riparistoj.
Tia estas Kubo!





Post dudek jaroj oni denove kongresis en Kubo. De la 17a ĝis la 24-a de julio 2010, okazis en Havano la 95-a Universala Kongreso de Esperanto. Sub tropika suno proksimume milo da esperantistoj el 59 landoj ĝuis neforgeseble agrablan kaj varman kongreson. Feliĉe povis partopreni ĝin ankaŭ multaj kubanoj kaj pluraj latino-amerikanoj. La inaŭguro estis kiel



konatigis kun la geografio, la muzikiloj, la tradicia ĉemizo "gvajabero", la sansistemo, la alfabetiga programo kaj kun aliaj kutimoj kaj belaĵoj por pli bona imago de la gastiganta lando.

La kongresa kuriero nomata "Havana Karavano" raportis pri ĵusaj okazintaĵoj, kunvenaj raportoj, atentigis nin pri certaj programeroj, diversaj anoncoj, aldonaj aliĝantoj ktp. Oni intervjuis plurajn geespe-



kutime solena kaj daŭris ĝis tagmezo. Ĉeestis ĝin, krom kelkaj ambasadoroj, la vicministro pri kulturo, kiu komence salutis nin en bona Esperanto. Kongreson salutis ankaŭ landaj E-reprezentantoj.

Ĉiam tre aprezata estas la sabatvespera Movada Foiro dum kiu oni interkonatiĝas kaj informiĝas pri diversaj E-organizoj. La Kleriga Lundo kaj la Tago de la Lernejo ankaŭ altiras multajn interesulojn. Dum la kongresa semajno okazis seminarioj pri diversaj temoj kaj diskuttrondoj, kunvenoj, fakaj kaj sciencaj prelegoj, komitatkunsidoj, esperantologia konferenco, IKU, AIS, danc- kaj lingvaj kursoj, oratora kaj belarta konkursoj, aŭtoraj duonhoroj, aŭkcio, artaj aranĝoj, kaj aliaj interesaj programeroj. Estis pritraktita la kongresa temo - "Interproksimigo de kulturoj", kaj oni parolis pri lingva diverseco en Latinameriko. Prezento de Mez-Amerika kulturriĉeco de Gvatemalo kaj Meksiko estis akompanata per trafikaj bildoj. Multnombraj prelegoj pri Kubo nin

rantistojn. Pri la evento ĉiutage raportis kuba televido kaj radio. Ankaŭ en gazetoj aperis artikoloj pri nia kongreso.

Estis elektita nova estraro, sed Probal Dasgupta

Tuttaga ekskurso al Viñales



daŭrigos sian prezidantecon. Dum akcepto en la hotelo "Habana Riviera" la vicministro pri kulturo interŝanĝis donacojn kun la prezidanto de UEA.

Antaŭ la fino de la kongreso okazis KER ekzamenoj. Elstaraj aktivuloj de Esperanto estis premiitaj en la fermo de la UK. Al kubanoj estis oferita kupono por ke ili povu aĉeti librojn aŭ aliajn esperantaĵojn en la libroservo. Paralele la gejunuloj havis sian propran programon en la hotelo Neptuno.

Sur-roka fresko



kubajn dancojn. La E-muzikgrupo "Amindaj" animis kaj gajigis la ĉeestantojn. Montrigis, ke ne nur kubanoj, sed ĉiuj latin-amerikanoj estas denaske ritme dotitaj. Aperis onidiro, ke pro la muziko la kubanoj

Afrika kulturo en Kubo



Vic-ministro pri kulturo akceptas kongresanojn

Amasan partoprenon kaj grandan intereson vekis la kulturaj kaj turismaj programeroj. Ni konatiĝis kun kuba kulturo, havis okazon sperti la ĉiutagan vivon de kubanoj kaj spekti la naturan belecon de la lando, ĝui maron kaj sinceran akcepton kaj helpemon de ĉiam gajaj kubanoj.

Urbaj promenoj permesis malkovri ne nur la kolonian arkitekturon, pitoreskajn lokojn, sed ankaŭ la ĉiutagan vivritmon de kubanoj. Tuttagaj ekskursoj al belaj lokoj ebligis admiri la belegan naturon, la penigan vivon de kamparanoj kaj la lukson de la konata feriejo Varadero.

La kubanoj sukcesis aranĝi buntajn kulturajn aranĝojn. En ĉiutaga posttagmeza kabaredo oni instruis danci la ŝatatajn "salsa", "merenge" kaj aliajn

ne havas tempon kuiri komplikajn manĝaĵojn. Do, rizo kun fazeoloj estas la ĉefa ĉiutaga manĝo. Kontraste, la bankedo ofertis plurajn pladojn por kontento de la partoprenantaj esperantistoj. La balo en latin-

amerika ritmo ĝojigis ĉiujn dancantojn.

Inter vesperaj kulturaj programeroj mi citas: nacian vesperon, teatraĵon, koncerton de "Interkant", internacian artan vesperon. Neforgebla kaj bunta estis la nokta spektaklo en la plej fama kabaredo de Kubo "TROPICANA".

Infanoj de la infan-kongreseto



Ĉe la fermo de la UK intervenis kvardeko da entuziasmaj infanoj, kiuj havis sian kongreseton ankaŭ en Havano. La kongreso estis plensukcesa kaj gaja, kiel kubanoj mem. Ni ĝuis belajn tagojn.

La publiko ĉe la fermo de la kongreso



Liba GABALDA



Fotoj : Andreo




Konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

La 43a ILEI-konferenco okazis de la 11a ĝis la 17a de julio 2010 en Matanzas je 100 km de Havano, semajnon antaŭ la UK. ILEI estas Internacia Ligo de Esperantistaj-Instruistoj. Kun pli ol 60 partoprenintoj el 26 landoj, ĉi tio fariĝas la plej granda evento de ILEI en Ameriko. Dum tiu aranĝo okazis diversaj konferencoj kaj ankaŭ seminario, kiun partoprenis pluraj gejunuloj ĉefe el Latinamerikaj landoj kiel Argentino, Bolivio, Dominika Resp., Haitio, Meksikio, Nikaragvo kaj Urugvajo, por ke ili estu en siaj hejmlandoj pli efikaj kursgvidantoj kaj organizaj motoroj. Aliaj partoprenantoj ĉeestis la prelegojn de diversaj fakuloj la specifajn kunvenojn de ILEI kaj la turismajn programojn. Riĉa programo plenigis la tutan semajnon.



Julián Hernandez Angulo malfermis la konferencon kaj per siaj bonvenigaj vortoj emfazis la gravan respondecon de Esperanto-instruistoj ene de la movado, kaj ilian ŝlosilan rolon gvidi novulojn en la Esperanto-komunumon. Maritza Gutiérrez González salutis nome de la Amerika Komisiono de UEA, klarigante kiel realiĝis la paralele organizita instruisto-trejna seminario, dank'al kunlaboro de seso da institucioj kaj fondaĵoj. La prezidanto de ILEI, Stefan MacGill emfazis en sia saluto, ke tri el la kvin konferencoj inter 2007 kaj 2011 okazis ekster Eŭropo. Krome la ĉi-jara konferenco ĝuas kulturen diversecon, ekvilibron inter pluraj ĝeneracioj kaj partoprenon de pluraj kubaj kolegoj.

La tuta aranĝo okazis en komforta hotelo je 5 km de la urbo Matanzas. Diversaj fakuloj pri edukado kaj pedagogio interese prelegis pri siaj fakoj. Krome ankaŭ okazis specifaj kunvenoj de ILEI, kiujn ege lerte gvidis la prezidanto Stefan MacGill. ILEI eldonas du revuojn, "Juna Amiko" por komencantoj, kun uzo de nur 1500 vortoj;



kaj IPR (Internacia pedagogia revuo. IPR prezentas instru-fakajn artikolojn, edukajn novaĵojn, recenzojn de lernolibroj kaj de alispecaj lerno-materialoj, organizajn informojn. Ĝi estas ankaŭ ligilo inter bazlernejoj, mezlernejoj, altlernejoj kaj universitatoj, kie Esperanto estas instruata. La distraj vesperoj allogis ĉiujn partoprenantojn, seminarianojn (ĉefe gejunuloj) kaj konferencanojn kaj okazis en tre simpatia etoso. Tre ŝatataj estis la kuba kaj latin-amerika vesperoj kaj laste la internacia adiaŭa vespero, en kiu partoprenantoj de ĉiu lando iel partoprenis. Dum la tuttaga ekskurso al Varadero, ni povis viziti tre luksan hotelo-komplekson, ĉefe por eksterlandaj turistoj. Ni povis ĝui vastan strandon kaj varman trankvilan maron sub varmega suno.

LINGVO - FESTIVALO

15.00 - -15.25	^A SYEDA SVEŜKA SUECO	^B LA HISPANA de LATINAMERIKO EL ESPERANTO de LATINAMERIKO	^C KREOLA CREOLE CREOLE	^E NEDERLANDA NEDERLANDS HOLANDES	^D KROATA HRVATSKI JEZIK CROATA	15.00 - -15.25
15.30 - -15.55	^A POLA POLSKI POLACO	^B LA INDIGENA LINGVO de MEXIKO LOS LENGUAS INDIGENAS de MEXICO	^C GERMANA DEUTSCH ALEMAN	^E FRANCA FRANCAIS FRANCES	^D ANGLA ENGLISH INGLES	15.30 - -15.55
16.00 - -16.25	^A ESPERANTO	^B RUMANA ROMANA RUMANO	^C JAPANA 日本語 JAPONES	^E HEBREA עברית HEBREGO	^D PORTUGALA PORTUGUES PORTUGUES	16.00 - -16.25
16.30 - -16.55	^A FINNA SUOMI FINLANDES	^B VALENCIA (KATALUNA) VALENCIA (CATALA) VALENCIANO (CATALAN)	^C ĈEĤA ĈESKY JAZYK CHECO	^E LITOVA LIETUVIU TALKA LITUANO	^D SERBA SRPSKI SERBIO	16.30 - -16.55

dum la 43-a ILEI-Konferenco, Matanzas, Kubo 2010



Christine el Haitio prezentas ĉi-tie la kreolan lingvon kaj poste la francan kune kun francoj kaj kanadano.

Aparte interesa programero de la semajno okazis en la lasta posttagmezo, nome la lingva festivalo sur centra placo, meze en la urbo Matanzas. Ĉe kvin tabloj dudeko da lingvoj kaj kulturoj estis sinsekve prezentitaj - ĉu rektmetode, ĉu pere de Esperanto kiel pontlingvo, laŭ la ĉi supra tabelo. Ĉiu duonhora estis ŝanĝo de lingvo.

La franca lingvo estis prezentita de partoprenantoj el Francio, Kebekio kaj Haitio. Kompreneble ni ankaŭ emfazis, ke pro Esperanto ni ĉiuj troviĝas en Kubo. La urbanoj tie pasantaj tre favore reagis. Bedaŭrinde subita pluvŝtormo iom interrompis la eventon. Fakte ĝi estis nur transigita al aŭlego de la urba biblioteko, kiu estis kunlabora partnero en la festivala realigo.

Inter la lingvoj troviĝis la hebrea, la rumana, la japana, la ĉeĥa, la serba, la litova, la portugala kaj eĉ la hispana kun variantoj en la diversaj latin-amerikaj landoj.

En ĉiu vespero Stefan MacGill faris tre fidelan sintezon pri la okazintaj eventoj de la tagoj, kaj sukcesis krei dinamikan kaj simpatian etoson.

La fermo finiĝis per emociaj dankoj kaj donacetoj al LKK, prelegintoj, la konferenca komisiito, Stefan MacGill la motoro de la aranĝo kaj ĉiu enplektita en la sukcesigo de la aranĝo, kaj kun firma intenco teni kontaktojn kun la kubaj kolegoj, kaj kun la junuloj de la seminario en multaj latin-amerikaj landoj.



La publiko



LKK-anoj




Ĉefplaco en Matanzas



Fotoj kaj tekstoj de Andreo

Kubo, lando de "kukoj"



Post-kongreso: turismado tra Kubo de Santiago de Kubo al Havano

Unu el la postkongresoj de UEA proponis viziton de Kubo de oriento al okcidento, nome de Santiago de Kubo al Havano.

Tial post la fino de la Universala kongreso la partoprenantoj de tiu turisma semajno unue flugis per interna flug-kompanio de Havano al Santiago de Kubo. Tie aŭtobuso veturigis ĉiujn al turisma hotelo.


La postan tagon ni vizitis iom la urbon, la muzeon de la revolucio, sur kies fasado videblis la spuroj de pafadoj fare de revolucianoj.

La konvertebla kuba peso (hispane *peso cubano convertible*), mallongigite CUC kaj en neformala lingvo-uzo ankaŭ nomata hispane *Chavito* aŭ *Fula* kaj esperante **kuko**, estas unu el la du valutoj en Kubo kaj origine enkondukiĝis kiel loka alternativo al la usona dolaro. Nuntempe ĝi servas kiel paga unuo inter kubaj entreprenoj, kiel pagilo por eksterlandaj turistoj kaj por aĉeto de tiel nomataj "luksaj varoj", do varoj kutime ne aĉeteblaj per la "nacia valuto" kuba peso. Ambaŭ kubaj valutoj dividiĝas en 100 centavojn. La kodo laŭ la normo ISO 4217 estas CUC. Malgraŭ sia nomo la *peso convertible* ne estas libere konvertebla.



Tiu monumento simbolas la tranĉilojn, kiujn uzis la sklavoj kaj laboristoj por tranĉi la sukerkanon. Ĝi montras 27 "tranĉilojn" kiuj simbolas la 27 vundojn, kiujn superis Antonio Maceo en la sendependa batalo.

En tiu dimanĉo la preĝejo de Santiago estis plena



Santiago estas Santiago. Kun la klopodoj de ĉiuj ni venkos.

Multaj bedaŭris, ke en la posttagmezo estis nenio planita, krom restado en la hotelo. Certe eblis ripozi kaj ĝui la hotelan naĝejon. Krome iuj private planis viziti la urban karnavalon. Tiam estis la 25a de julio ĵus antaŭ la nacia festotago de la 26a de julio. Multaj flagoj tra la lando memorigis pri tiu tago.

Eblis uzi taksion, kiu facile akceptas 6 pasaĝerojn en sia jam pli ol 50-jara aŭto. Ne utilis kontroli ĉu ĉiuj akcesoraĵoj bone funkcias. Ĉefas povi veturi. La karnavalo okazis en plene entuziasma etoso. Kaj je noktomezo kiam ekestis la nacia festotago, paradis la soldatoj portante grandegan nacian flagon.

Ni estis en Kubo.



La postan tagon ni celis atingi la urbon Camagüey. Ĝi havas ĉirkaŭ 325000 enloĝantojn kaj estas la dua plej granda post Havano kaj tria plej grava post Havano kaj Santiago de Cuba. Survoje ni vizitis preĝejon kaj povis vidi diversajn transportilojn uzatajn en Kubo



La bildo de **Che Comandante** estas ofte videbla, jen ĉe fasado de domo.

Survoje al Trinidad ni atingis tiun turon 45 metrojn alta kaj kun 136 ŝtupoj. De supre vidiĝis vasta pejzaĝo, ĉefe kamparo kaj montaro. Ĉe apuda restoracio eblis mem premi sukerkanojn por produkti iomete da suker-suko kaj ĝin gustumi. Vespere nia hotelo havis aliron ala suda marbordo, kaj krome eblis ĝui la internan naĝejon.



Nia hotelo en Santa Clara estis fondita el antikva indiĝena vilaĝo Cubanacán. Tial plej multaj ĉambroj troviĝis en apartaj pajlo-kovritaj dometoj. Tio donis agrablan kaj tipan etoson al tiu hotelo

Santa Clara troviĝas preskaŭ en la mezo de la insulo Kubo. Tie troviĝas pluraj memoraĵoj de la revolucio Che Guevara. Ni vizitis unue la vagonojn, kiuj rilatis al lia venko en decembro 1958. Sed plej impona estas la maŭzoleo, la placo kaj la grandega monumento je lia memoro.



En la lasta tago ni atingis Havanon kaj tiel finiĝis tiu postkongreso.

Tiu tuta vojaĝo estis okazo sperti pri la vivo en Kubo, kiel turisto.

La enloĝantoj vivas en aliaj kondiĉoj, kun alia mono, kun trafikiloj malnovaj aŭ eĉ kadukaj. Aŭtoj kaj aŭtobusoj el antaŭ 50 jaroj, eĉ ne riparindaj, eble el Usono.

Eble dank'al la turismo la ekonomio de Kubo povos iom post iom pliboniĝi.



66^a Internacia Junulara Kongreso

Villa Trópico, La Habana, Kubo



Unu el la 3 postkongresoj de UEA estis muligita kaj anstataŭe estis proponita partopreno al IJK. Tre verŝajne pro tio, ni nun povas ĝui la raporton de Liba kaj ŝian entuziasmon. Dankon al ŝi.

La lasta, kvara Esperanto-evento en Kubo - IJK okazis tuj post la 95-a Universala Kongreso, la lastan semajnon en julio, en la bela ĉemara turismejo "Villa Trópico" en la regiono de Matanzas. Ĝi situas mezdistance inter la ĉefurbo Havano kaj konata feriejo Varadero. Al la kongreso aliĝis 133 geesperantistoj, sed lastmomente aldoniĝis kelkaj pliaj. Bonŝance multaj latinamerikanoj havis unikan okazon partopreni la eventon. Krom kubanoj venis gejunuloj



el Argentino, Bolivio, Brazilo, Dominika respubliko, Haitio, Meksiko, Nikaragvo, Peruo, Venezuelo. Tiel ekestis bunta mozaiko el diversaj landoj.

LKK-anoj zorgis pri transportado. Ĉe la alveno ni estis regalitaj per koktelo. Grupo de muzikistoj bonvenigis nin per tipaj kubaj kantoj. Amuza virino (travestita viro) invitis al dancado.

Pro la situo la kongreso estis iom pli ripoziga ol kutime. La fiksitajn programerojn oni kompletigis surloke per kelkaj aldonaj. La gejunuloj pasigis multe

da tempo gaje amuziĝante ĉe la naĝejo. Okazis pilkludoj naĝejaj kaj herbejaj. Krome oni ĝissate profitis la maron. Ĝi estis ideala loko ne nur por naĝi, sed ankaŭ por observi submaran riĉecon de fiŝoj kaj koraloj en proksima koralrifo. Iuj profitis promenadon sur pedalŝipoj aŭ nur simplan sunumadon en ombro de kelkaj arboj kaj palmoj.



La ofertitaj servoj entenis trifojan tagan manĝadon, liber-volan servon ĉe la trinkejo, prunton de necesaj akcesoraĵoj por sub-akvigado, plaĝtukojn. . .

Ni loĝis en komfortaj bangaloj panorame al maro. La apuda naturo de verda monto invitis al grimrado. Dum la promeno ni vizitis proksiman vilaĝon, kie ni gustumis kelkajn fruktojn kaj kokosojn. Junuloj

havis siajn komitatkunsidojn kaj prelegojn. Ĉe la komenco Marek Blauŝ klarigis kio estas E@I, konatigis ĝiajn principojn kaj prezentis ties ambiciajn projektojn. Amri Wandel parolis kaj skizis la historion de TEJO - "Kiam, kiel, kial". De Franklin Montenegro ni eksciis pri Yamar -Festo. La gejunuloj ŝatis diversajn danc- kaj lingvo-kursojn.

Tre interesa estis la Lingva Festivalo okazinta surloke ĉe la naĝejo. Oni prezentis pli ol dek lingvojn. Brazilanoj aldone invitis al "edziĝfestoj - kvadrilo" (brazila kampara danco),

kio estis gaja okazaĵo por ĉiuj ĉeestantoj. Pano el Danio regalis nin per tipaj produktoj: pano, fromaĝo, fiŝaĵo kaj likvoro.

Ankaŭ rusoj regalis nin per kelkaj specialaĵoj: vodko kaj kaviaro.

Aliaj proponis kelkajn surlokan frandaĵojn.


Meksikanoj, krom bela ekspozicio

de memoraĵoj kaj kelkaj bongustaĵoj, prezentis tipan meksikan dancon. Ili estis bele kostumitaj. Koreoj instigis al kaligrafia skribado. Marek kaj mi prezentis la ĉeĥan lingvon. Kubanoj gaje dancis.

La vesperaj programeroj okazis en teatrejo, kie oni poste povis "ĝui" noktan diskotekon. Interesitoj povis rigardi esperantigitajn filmojn. Ĝis malfruaj horoj funkciis la kutimaj "gufujo" kaj trinkejo ĉe la naĝejo. Tio sub tropikvarma kaj stelĉiela nokto estis agraba okazo por babilado.

La hotelo dufoje proponis kaj organizis por ni profesion, kabaredan spektaklon kun muzika akompano. Ankaŭ

la E-muzikgrupo "Amindaj" havis okazon prezenti sin kaj dancigi la ĉeestantojn. Dum la planita ekskursita tago, unu tuttaga ekskurso celis la proksiman urbon Matanzas kaj la alia vizitigis al ni Havanon. Dum nia restado ni spertis ankaŭ fortan tropikan pluvegon, dum kiu elbordiĝis la rivero kaj makulis per nigraj akvoj kaj malpuraĵoj la maron. Tamen, la sekvan tagon la maro denove helbluis. Ravaj estis la vesperaj sunsubiroj, kiuj kolorigis la ĉielon kaj la strandon ruĝe. Dum la IJK ni ĝuis trankvilon ĉe la bela plaĝo, bonajn manĝojn kaj gajan junulan etoson.





Tre interesan pertrajan vojaĝon ni efektiviĝis en junio 2010 de Moskvo al Ulanbatoro, kie ni partoprenis la 6-an Azian Kongreson de Esperanto. La vojaĝo daŭris 9 tagojn kun interrompoj en pluraj lokoj de Rusio. Ni estis grupo de 26 geesperantistoj el 7 landoj. La vojaĝon organizis

kaj gvidis Tatjana Loskutova el Rusio. Post 5 tagoj pasigitaj en Moskvo ni startis la 10-an de junio de la stacidomo "Kazanskij". La trajno havis 19 vagonojn inkluzive restoracian. La vagonoj estis kupeaj kaj komunaj kuŝlokaj nomataj "plackart". (Ekzistas ankaŭ vagono kun pli luksaj kupeoj dulokaj kun televido kaj plia komforto). Mia edzo Floreal kaj mi volis sperti ambaŭ variantojn kaj tio efektiviĝis. Unue, ni veturis en kupeo (po kvar personoj) kun geedza paro el Francio kaj poste en "plackart" kun portugala paro kaj aliaj homoj inter kiuj kelkaj geesperantistoj. Ĉiun vagonon akompanas du stevaroj, kiuj alterne deĵoras tage kaj nokte. Ili prizorgas la pasaĝerojn kaj la bonan funkciadon de ĉio en la vagono dum la vojaĝo. Krom aliaj taskoj ili ankaŭ zorgas pri pureco de la vagono. Niaj stevaroj estis du ĉarmaj studentinoj. En la koridoro estis varma kaj malvarma akvoj je ĉies dispono. Oni povas pretigi al si teon, kafon, solveblan supon kaj similajn aferojn. En pli grandaj kaj gravaj stacioj la trajno haltas duonhoron kaj eĉ pli. Sur la kajo jam atendas amaso da lokaj homoj kun



diversaj varoj por vendi. Ili ĉefe proponas hejm-faritajn varmajn manĝaĵojn, trinkaĵojn, legomojn, fruktojn, dolĉaĵojn. Oni povas sin bone provizi kaj gustumi tieajn produktojn. En la restoracia vagono oni ankaŭ bone manĝas. Ofte ni estis la solaj pasaĝeroj, kiuj profitis tiun-ĉi servon. Lokanoj kutime kunportas sian propran provizon kaj manĝas en sia vagono.

Dum longa halto en Novosibirsk mi profitis la okazon kaj marŝis sur la kajo ĝis la lokomotivo. La lokomotiv-estro permesis al mi supreniri la maŝinon. Ĝi estis malnova, fabrikita en Ĉeĥio jam en la kvindekaj jaroj. Li estis tre kontenta, ke ĝi bone funkcias. Mi fotis kaj filmis ĝin ankaŭ interne. Sidi en ĉeĥa lokomotivo en Rusio estis por mi bela travivaĵo.

En la trajno ni pasigis tri noktojn antaŭ ol alveni kaj halti en Krasnojarsk. Tie nin gaje atendis geesperantistoj kaj ni pasigis kun ili du tagojn. La loka televido filmis la alvenon de nia E-karavano kaj intervjuis kelkajn el ni kun helpo de

Tatjana. De Krasnojarsk al Irkutsk Floreal kaj mi transiris al "plackarta" vagono. En ĝi veturis plejparte uzbekoj. Kiel mi eksciis, ili konstruas en Irkutsk lernejon. Inter plenkreskuloj estis ankaŭ junaj knaboj, kiuj ne komprenis, nek parolis la rusan lingvon. Oni klarigis al mi, ke por helpi al siaj gepatroj ili devis labori de junaĝo kaj ne povis frekventi lernejon. Pro tio ili konas nur la gepatran lingvon. Mi sufiĉe bone interkompreniĝis per la rusa, ĉar antaŭ pli ol kvardek jaroj mi lernis ĝin. Tamen, mi devas konfesi, ke antaŭ tiu-ĉi vojaĝo mi iom reviziis miajn konojn. Tio estiĝis tre utila, mi povis senprobleme konversacii kun rusoj kaj same en



Mongolio (kun pli aĝaj personoj). En la trajno pluraj scivolis pri Esperanto, do mi donis al ili kelkajn informojn kaj lecionojn. Ili estis tre entuziasmaj, sed ĉu ili daŭrigos la studadon per la reto kiel mi rekomendis al ili?

En Irkutsk atendis nin unu esperantisto kaj virino de la vojaĝ-agentejo. Ili montris al ni la urbon kaj poste ni veturis buse kaj ŝipe al la insulo Olĥon en la lago Bajkal. Tie ni pasigis du agrablajn tagojn vizitante ĝin piede, aŭte kaj ŝipe.

La lastan etapon, ĝis Ulanbatoro, ni ĉiuj veturis en kupea vagono. La tempo rapide pasis, ni interbabilis, ŝercis, multe ridis, rigardis pejzaĝon, fotis kaj filmis, iuj legis, sudokumis, mi krucenigis. Multe da tempo ni pasigis ĉe la landlimo inter Rusio kaj Mongolio. Dogan- kaj pasport-kontrolo longe daŭris, ili estis severaj. Post unu lasta nokto en la trajno, la 19-an de junio ni atingis la mongolian ĉefurbon, kie jam atendis nin lokaj geesperantistoj. La vojaĝo estis tre interesa sperto kun emociaj impresoj.

Liba Gabalda



LA 6-a AZIA KONGRESO DE ESPERANTO

De la 19a ĝis la 23a de junio okazis en Ulanbatoro, la ĉefurbo de Mongolio, la 6-a Azia kongreso de Esperanto. La kongresa temo estis "Azia harmoniigo per Esperanto". Ĝi altiris precipe azianojn, sed partoprenis ĝin ankaŭ kelkdeko da alilkontinentanoj. 24 entuziasmoj alvenis per la Tra-Siberia Fervojo. Entute la eventon ĉeestis pli ol 200 kongresanoj el 27 landoj. Mankis nur afrikanoj. La kongresejo troviĝis en luksa kvinstela hotelo Ĉingis-Ĥano proksima al la urbo-centro.

La kongreson organizis KAEM (Komisiono pri Azia E-Movado) kun lokaj esperantistoj. En la kunsido de KAEM estis elektita nova prezidanto. En la malferma ceremonio la kongreson salutis anstataŭanto de la ĉefministro. Oni legis kelkajn salut-mesaĝojn kaj poste la membroj de la partoprenantaj landoj salutis la ĉeestantaron.



Multaj interesaj debatoj, seminarioj, prelegoj kaj aliaj altiraj programeroj okazis dum la kongresa semajno: Interkona vespero, fakaj kunsidoj, oratora konkurso, konversaciaj rondoj, aŭkcio, nacia kaj internacia vespero. Ni konatiĝis kun mongola historio, arto kaj kulturo, ni provis lerni la mongolan lingvon kaj eksciis pri la Mongola E-movado, pri Esperanto en Unesko. Interesa kaj inspira estis elmonro de kaligrafio de la tuta Azio. Ankaŭ gejunuloj havis sian kunsidon, eĉ sport-amantoj de tablotenis kaj diversaj religiaj grupoj trovis sian lokon tie.

Dum la tuttaga urba ekskurso ni konatiĝis kun vidindaĵoj de Ulanbatoro kaj de supre ni povis vidi tiun pli ol milionhoman metropolon.

Nacia vespero okazis en teatro ekster la kongresejo. Ni spektis tradiciajn dancojn, kantojn kaj akrobataĵojn fare de profesiuloj. Ĝi estis admirinda spektaklo de arta scipovo kaj prezentado. Same belan kaj altkvalitan prezentadon ni povis spekti en la kongresejo plenumita de infangrupo. La internacia vespero estas tradicie dediĉita al talentoj el niaj vicoj. La vespero komenciĝis per parado de ĉiuj kontribuintoj en naciaj kostumoj. Japanoj paradis vestitaj en "jukata" vestaĵoj. Poste oni montris al ni kiel surmeti kimonojn. Prezentiĝis diversaj muzikistoj, japanoj kaj ĉinoj montris ion el sia kulturo kaj ni admire spektis tiun kulturan kalejdoskopon...

La Azia kongreso estis vere impresa kaj fruktodona renkontiĝo. Ĝi liveris al esperantistoj la eblon ĝui eksterordinare belan etoson, formi novajn amikecojn kaj malkovri mirindajn regionojn de la dezerto Gobi dum la turismaj antaŭ- kaj post-kongresaj ofertoj. Malfacilas esprimi en unu paĝo ĉiujn nuancojn de tiu bela evento. Denove pruvigis, ke Esperanto estas la Internacia lingvo de komprenemo kaj amikeco.

Mi certas, ke ekde nun la movado tie plifortiĝos, ĉar la entuziasmo de mongolaj esperantistoj estis grandega. Por multaj el ili la kongreso estis unika sperto.

En la Azia kongreso ni harmonie esperantumis, ĝuis agrablajn eventojn kaj amikajn renkontiĝojn, kio donis al ĉiuj grandan ĝojon kaj entuziasmon daŭrigi prosperantan vojon.



Mia semajno en Pluezek

” Pluezek-renkontoj estas unikaĵo, mi devis vidi tion por esti konvinkita...

La unua eco, kiu frapas min, estas la afabla bonvenigo. Eliranta el la trajno en *Paimpol*, mi trovas kelkajn aliajn eltrajniĝintojn kaj mi konstatas, ke ni jam estas atenditaj; oni kondukas nin al Pluezek, en la festo-domon de la vilaĝo. Tie, skipo de babilantaj homoj ĉe granda tablo elguŝigas grajnoj de fazeoloj (kuirejo kaj manĝejo apudas la festo-salono), ili laboras por la apetito de la 130 partoprenantoj, kiuj plejparte manĝos en la festo-salono dum la tuta semajno. Mi partoprenas en la elguŝigo.



Poste alvenas *Hélène Dubois*, kiu kondukas nin aŭtomobile ĝis niaj ĉambroj, kelkajn kilometrojn for. Niaj nomoj estas afiŝitaj sur paperoj ĉe la pordoj. Surprizo: mia kunĉambranino estas unu el miaj eks-lernantoj de interret-kursoj. Ni rapide reamikiĝas kaj eĉ pli ol amikiĝas.

La interhelpo kaj la familia etoso estos la daŭra trajto de la tuta semajno, ĉar la organizantoj kaj la ĉeestantoj kune laboras por : surtabligi la manĝilaron, ordigi la tablojn post la manĝo, balai kaj helpi al viŝado de manĝiloj, ĉar lav-maŝino ekzistas sed ĝi ne

komplete sekigas la telerojn, kaj la korboj ne sufiĉus por atendi la sekigon sen interveno de la viŝtukoj...

La dua afero, kiu frapas min, estas la tre bona organizo. Ili ja faras la 14an renkonton kaj tre spertas. En la vasta festo-salono, kiu estas la koro de la aranĝo, kaj en kiu ĉiuj venas por interbabili, manĝi, rigardi la riĉan libro-servon kaj festi vespere, afiŝitaj paperoj montras listojn de homoj laŭ la matena elektita fako, kaj aliaj laŭ la "serioza hobia" (ateliero) elektita por la fino de ĉiu posttagmezo. Se vi ne estas enskribitaj, vi alskribas vian nomon.

Pri la "serioza hobia", mi jam estas notita por la ĉina lingvo (tio estis mia deziro); por la kurso aŭ diskut-rondo, ŝajnas ke mi elektis nenium; mi decidis ĉeesti la kurson de infanoj por kapti ideojn utilajn ĉe kursoj por komencantoj.



La tria afero, kiu agrablas al mi, estas la ekvilibro inter laboro kaj distraĵoj, kaj la bonvena manko de dilemo inter laboro kaj distraĵo. Ĉiuj ĉeestas kursojn aŭ diskut-rondojn matene de la 9a ĝis la 12a en la klas-ĉambroj de la lernejo, kiu situas je kelkaj minutoj piede. Ĉiuj manĝas inter la 12a30 kaj la 14a (en la festo-salono aŭ per siaj propraj rimedoj), ĉiuj promenas aŭtomobile aŭ piede inter la 14a kaj la 17a al diversaj vidindaĵoj. (Ĉiutage, du promenadoj estas organizataj kaj almenaŭ unu estas senpaga). La homoj, kiuj havas veturilojn prenas kun si la senveturilajn homojn. Kion diri pri la ekskursoj, ne necesas multe marŝi por vidi mirindaĵojn; la maro estas tute proksima, la vilaĝo mem estas rava, ne necesas fari multajn kilometrojn, nek piede nek aŭtomobile (ofte parte aŭtomobile, parte piede).



Post la promenadoj, ni denove iras al la klas-ĉambroj inter la 17a kaj la 19a por niaj "seriozaj hobiaj". Ni povas elekti inter teatro, ĉina lingvo, Tinĉjo, informadiko, koruso, joko kaj alia fako (mi ne plu memoras). Ĉiu grupo ne nur lernas sed plie preparas ion por la lasta distra vespero, la ĉina grupo lernas kanzonon en la ĉina lingvo.


Inter la 19a30 kaj la 21a, ni vesper-manĝas (parenteze, la manĝo estis bonega). Poste, ĉiutage okazas distra vespero ĝenerale en la festo-salono, kie ĉiuj kuniĝas por bonegaj programoj: koncerto de klasika muziko (tiu-ĉi en la vilaĝa preĝejo, ankaŭ venis vilaĝanoj), bretonaj dancoj, bildoj kaj rakontoj pri Nepalo fare de Poshray Subedi, kantoj de ĉiuj landoj fare de la sin-proponantaj ĉeestantoj, filmo kaj rakonto pri "Bona Espero" fare de la paro Grattapaglia (tre emociigaj momentoj) kaj ĉe la lasta vespero, ĉiu grupo prezentas skeĉojn kaj kantojn; ĉio finiĝas per freza danca farandolo. Kia etoso !!! nekredebla !!



La kvara konstato estas, ke tiuj mirindaj renkontoj funkcias per minimume da mono, la bonvolemluloj multas, la ĉeestantoj ofte animas mem, do oni ne bezonas pagi por profesiaj amuzantoj, la urbo-domo pruntedonas la festo-salonon kaj la klasĉambrojn; la konstanta interhelpo de la partoprenantoj ebligas vojaĝetojn sen luado de busoj (krom por la vizito al la gaŭla vilaĝo). La plej kosta afero por la organizantoj estas pagi tute aux parte la vojaĝ-kostojn de la altnivelaj instruistoj (kaj ili ne hezitas bonvenigi tre altnivelajn fakulojn kaj gastojn!). Ĉu kredeblas, ke en la sama semajno ni povas familie



babili kun: *Stefan Mac Gill, Barbara Pietrzak, Perla Mielo*, la ĉina junulino *Nian* (kiu studas en Toulouse) tre talenta por la ĉinaj kursoj, *Poshray Subedi, Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia, Michel Dechy, Claude kaj Anne Jausions, ktp....* Ankaŭ venis aliaj kompetentuloj, pri koruso, jogo kaj informadiko, kiuj estas najbaraj. Mi ankaŭ devas citi *Pauline-n*, kiu zorgis pri la infanoj kun *Nian*, kaj mi certe forgesas kelkajn.



Alia trajto, kiu frapis min unuavide, estas ke multaj partoprenantoj estas bretonaj kaj kelkaj ne plu tre junaj; tamen post kelkaj momentoj, mi surprize konstatis ke, blankharaj aŭ ne, la bonvoluloj kaj bonvolulinoj ŝoforas, kantas, dancas, saltas, tradukas, organizas, ridas, klarigas, ŝercas, amuzas nin, helpas al ĉio, kaj en sufiĉe bona esperanto. Dum la vespero de la bretonaj dancoj, la gejunuloj de la vilaĝo venis danci kun ni. Kia festo, preskaŭ neniu povis elteni sidadon sur seĝoj. Jes, mi povas iom kompari la etoson de Pluezek al la etoso de la kongreso de gejunuloj en *Liberec*. La etoso estis simila kaj bonega, tre ĝoja.

Ĉu kopieblaj tiaj renkontoj?... certe malfacile, ĉar necesas organizado fare de bona kaj ampleksa grupo de personoj, kiuj jam kutimas labori kune, necesas ke la aranĝo estu unusemajna por bona laboro kaj plifortigo de la amikeco.

Kaj kaj ...

Vere tiuj bretonoj ŝajnas el speciala admirinda forta raso!

Jen mia konkludo...“

Ginette MARTIN

Fotoj – 1 / la spektaklo de la bela maro donas al ni fortojn kaj ĝojon. 2 / la ĉina junulo *Da* dum la manĝo ĉe la tablo de infanoj. 3 / la nepalo *Poŝka* devis vesti sin je la bretona modo kun bretona kufo kaj lignaj ŝuoj, aliaj devis vesti sin kun la nepala ĉapo. Ĉio-ĉi por celebri bretonan-nepalan amikecon. 4 / infanoj prov-ludas teatraĵon. 5 / *Loguivy-de-la-maro*. Ni iras al tiu roko, kiu povas pensigi nin pri malgranda *Monto Sankta Mikaelo*. 6 / *Gaby*, tre vigla 90-jaraĝa persono.



Deuxième chef-d'oeuvre de la littérature espérantophone traduit en français

A l'initiative de Ginette MARTIN, membre d'Espéranto France-Est et de Godeleine LOGEZ (traduction) est parue la traduction française de «*La Stona Urbo*» de Anna Löwenstein. Ce fut de suite un best-seller.

IL raconte l'histoire d'une jeune celte venue à Rome comme esclave du temps des premiers chrétiens. Un roman passionnant !

C'est une deuxième oeuvre de la littérature espérantiste traduite par Ginette Martin, après le récit de l'auteure espérantiste Spomenka Stimec «*Kroata milita noktlibro*» (journal de nuit: témoignage de femme dans la Croatie en guerre).

Rappelons que les deux ouvrages sont disponibles dans notre Libroservo. Une occasion de faire découvrir à vos amis non espérantistes des chefs-d'oeuvre de notre littérature.

BONA ESPERO

idealo kaj realo

Jam de kelkaj jaroj Michel Basso, prezidanto de TAKE, kunlaboras kun Bona Espero en Brazilo, por plantado de arboj. La 3an de aŭgusto, Michel Basso gastigis Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia en Colmar dum ilia vojaĝo tra Eŭropo. Ili estras jam de pli ol 30 jaroj la centron Bona Espero, kie brazilaj infanoj ricevas taŭgan edukadon por poste trovi pli dignan lokon en la vivo kaj krome ili lernas Esperanton.

Apud tiu centro Michel Basso akiris vastan terenon por planti arbojn laŭ la rekomendoj de UNEP (Unuiĝintaj Nacioj pri Medioprotektado) "Ni plantu por la planedo".

Vidu la retejon: <http://www.unep.org/billiontreecampaign/french/CampaignNews/Colmar.asp>



Jam pli ol 500 arboj estas jam plantitaj kaj bone kreskas. Ili estas prizorgataj de la anoj de Bona Espero.

Por iom festi la viziton de Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia, Michel proponis komunan manĝon en restoracio apud Colmar kun anoj el la grupoj de Mulhouse kaj Village-Neuf.

Tie ni interŝanĝis interesajn spertojn pri la vivo en Bona Espero, kiun vizitas multaj volontuloj tra la mondo kaj tiel akiras spertojn pri tia vivo en tute izolita loko. Krome ni ankaŭ diskutis pri Kubo, kie okazis pluraj Esperanto-eventoj en ĵus pasinta julio.

Michel kreis ret-paĝojn ene de TAKE. Ĝi informas pri nuna situacio de tiu projekto kaj montras kiel akiri je 15 eŭroj unu arbon en Brazilo ĉe Bona Espero. www.plantu-arbon.org
Krome ni rekomendas al vi akiri la libron de Roman Dobrzyński "Bona Espero idealo kaj realo"



Specifaj informoj el la ret-kuriero

« Karaj,
Hieraŭ mi en Kopenhago renkontiĝis kun du eksterlandaj esperantistoj por iom montri al ili la urbon.

Tiuokaze mi aŭdis ilian miron pri la altaj hotelprezoj. Ili pravas. Danlando estas multekosta por turistoj. Por tamen al laŭeble multaj ebligi enpartopreni la kongreson, mi sendas la sekvantajn informojn:


Se vi deziras ricevi konvenan, sed ne tro multekostan restadejon, eble la "lito kaj matenmanĝo"-oferto konvenas al vi.

Vi povus rigardi ekzemple

<http://www.copenhagenbedandbreakfast.dk/CopenhagenKortGB.htm> aŭ
<http://www.visitcopenhagen.dk/privatevaereiser/koebenhavn>.

Kompreneble ekzistas kelkaj similaj aliaj paĝoj krom la du menciitaj. Kompreneble vi ankaŭ serĉos ejon, de kie vi facile atingos la kongresejon. Se vi dependas de publikaj trafikiloj, tiam atentu, ke la kongresejo havas sian propran metroan stacion **Bella Center**. La staciplanon de Metro vi trovas ĉe <http://www.m.dk>.

Atentu, ke Metro estas io alia ol *S-banen*! Ŝanĝi inter tiuj du sistemoj eblas, kie <http://www.dsb.dk/Global/PDF/Koereplaner/S-tog/Alle%20linjer.pdf>.





sur la Metro-mapo estas la ruĝa sesangulo kun "s". La liniojn de *s-banen* vi trovos ĉe

Amike »
Peter Weide

Nördlingen
estas vin ĉi-jare!
ankaŭ ĉi-jare!

27-a IF kaj urbeto Nördlingen invitas vin

27a de decembro 2010 / 3a de januaro 2011



Nördlingen, la malgranda mezepoka urbo, invitas vin ankaŭ ĉi-jare: vin atendas med...
manĝoj kaj... donaj
partoprenu en niaj
promenu tra la pitoreska urbo,
sur la komplete konservita urba murego -
ĝuu nian internacian rondon en amika etoso.

Printu informilon-aligxilon rete! 27 www.internacia-festivalo.de

Festa jarfine kun ni!

◀ preĝeja turo 'Daniel' ▪ poŝtmarko el 1998 ▶



27-a IF - 30 decembro 2010 - ekskurso al München



◀ 'Hofbräuhaus' kaj servistino kun la tipaj 1-litraj kruĉoj ...
'Frauenkirche' (maldekstre) kaj 'Marienplatz' (centro) ▼



München, ĉefurbo de Bavario - la urbo de biero, la urbo de tradicio kaj lukso, urbo de 'Oktoberfest' (plej granda popola festo) kaj la urbo de 'Hofbräuhaus' ...
La iama reĝa bierfarejo estas verŝajne la plej konata restoracio de la mondo, ĉiukaze la 'deviga celo' dum Munkena vizito - ni tagmanĝos tie kaj ĝuos tipan bavaran manĝon ... ĝoju pri la fama Hofbräuhaus-biero - je via sano!

München - la urbo de biero - bonvenigas vin ...

MEDITERANEA ESPERANTO-SEMAJNO -



2011

26-a februaro ĝis 5-a marto 2011
Agay - Francio - Lazura Marbordo

INFORMOJ KAJ ALIĜOJ :

Monique Prezioso, 92 allée des Harkis, FR 83700 Saint-Raphael, Francio rete: prezmoni@hotmail.com; tel. 0033 (0)4 94 83 06 88 aŭ'

Christine Graissaguel, Les Iles d'Or, rue du progres, FR 83600 Frejus, Tel. 0033(0)494956618

INTERASOCIA RENKONTIĜO de ESPERANTO ĉe MEDITERANEO



SÈTE 22a ĝis 26a de aprilo 2011

« Le Lazaret » - La Corniche - 34200 SETE - FRANCIO



66-a KONGRESO de SAT-AMIKARO
NACIA INTERASOCIA KONGRESO de ESPERANTO-FRANCE
62-a KONGRESO de la FRANCAJ ESPERANTAJ FERVOJISTOJ

" L'espéranto aujourd'hui " (L'HARMATTAN) de Jacques Joguin
ISBN : 978-2-296-06220-7

Gravas, ke ne-esperantistaj eldonejoj aperigu informojn pri la internacia lingvo, tutsimple pro la fakto, ke tiuj verkoj estas pli larĝskale kaj pli facile alireblaj ol per la libroservoj enmovadaj. Ĝis nun la fama kolekto *Que sais-je ?* proponis kaj daŭre proponas la prezenton de Pierre JANTON, *L'espéranto*. Ĝi restas leginda kaj konsilinda.

Sed aperis en 2008 nova informlibreto pri Esperanto, *L'espéranto aujourd'hui* de Jacques JOGUIN ĉe la eldonejo L'HARMATTAN. La aŭtoro proponas en okdeko da paĝoj panoramon sufiĉe ampleksan de la atingoj de Esperanto. Sed li ankaŭ citas kaj « malmuntas » la antaŭjuĝojn plej oftajn, kiuj bremsas la ekinteresiĝon pri nia planlingvo.

Certe : en okdek paĝoj ne eblas amplekse priskribi Esperanton, por tio jam nun necesas iu enciklopedio – kion la nesciantoj tute ne imagas ! Sed tiu en iu ajn librovendejo facile akirebla informilo estas konsilinda legaĵo por granda averaĝa publiko, eĉ se ... mirigas la lasta ĉapitro, kiu pritraktas ege precize kaj detale la versfaradon en Esperanto ! Sed ni ja ofte diras, ke mankas en Esperanto fakaj artikoloj ! Kaj versfarado ankaŭ estas tekniko por atingi artan kvaliton en poeziaĵoj !

Oni certe povas bedaŭri kelkajn eraretojn en la unua eldono kaj du iom malnovet-aspektajn ilustraĵojn, sed ne hezitu konsili la verketon ĉirkaŭ vi.

Edmond LUDWIG

Gratulon al francaj ekzamenintoj ! STATISTIKO pri la KER- ekzamenoj 2010



31an de aŭgusto 2010 - "Gratulojn al la diligentaj francoj".
Katalin ***

Francio plu okupas la **1an lokon** inter 35 landoj, el kiuj esperantistoj ekzameniĝis, ĉu je B1, ĉu B2, ĉu C1 nivelo de la *Komuna Europa Referenckadro*, post la sesio okazinta dum la *77a Itala Kongreso* en Lignano Sabbiadoro.

Des pli gratulinde, sciante, ke ankoraŭ ne okazis ekzamen-sesio en Francio. Eble estos unu dum la *Internacia Renkontiĝo ĉe Mediteraneo (IREM)*, fine de aprilo 2011 en Sète.

PS - Notindas, ke en la listo estas aparte kalkulitaj *NovKaledonio* kaj *Katalunio*. Se Katalunio estis enkalkulita en la rezulto de Hispanio, tuta Hispanio okupas la 14an lokon... anstataŭ la nunan mizeran 24an.

Kore, Aleks

*** Dr. Katalin KOVÁTS, lingvoinstruisto, redaktoro
Sparwaterstraat 74 - 2593 RP - Den Haag - Nederlando
Ret-poŝt-adreso: katalin.kovats@gmail.com
Vizitu: <http://www.edukado.net> la servon de Esperanto-instruistoj
kaj serĉu *Esperanton* ankaŭ ĉi tie: <http://www.vggallery.com/index.html>

... Ili diplomiĝis ...



"Eĉ se ni ne estas nek estu (tro) naciistaj, tamen la Esperanto-movado nuntempa estas dividita en Landaj Asocioj, kiuj sekvas la limojn de la ekzistantaj landoj.

Kaj do mi deziras sincere gratuli niajn francajn premiitojn dum la ĵusa **95-a Universala Kongreso** en Havano, Kubo. Efektive pluraj homoj digne reprezentis nian landan movadon, tiumaniere atestis la viklecon kaj buntecon de ĝi, ricevinte premion dum la UK, ĉu en la *Belarta Konkurso*, ĉu *premion Deguĉi*, ĉu de *Fondaĵo Grabowski*, ĉu la tute novan Diplomon pri *Elstara Arta Agado*


Do, koran gratulon al :

- *Philippe Chavignon* (Premio Deguĉi)
- *Ĥorestrino Franĵo Lévêque*, Diplomo pri Elstara Arta Agado (ricevis unu el sep diplomoj)
- *Christian Rivière* (Belarta konkurso, Eseo, Unua premio, pro *Vortfarado kaj radik-farado*)
- "*Duoble Unu*" (Belarta konkurso, Kanto, Unua premio, pro *Sen lim' ĝis...*)
- Forpasinta *Madeleine de Zilah*, al kiu estis aljuĝita speciala premio de 500 USD de la *Fondaĵo Grabowski* (kiel kunfondinto de la revuo *La Gazeto* en 1985) "

Aleks Kadar

Speciala premio de 500 USD estas dedikita al la memoro de *Madeleine de Zilah*, kiu kunfondis la revuon *La Gazeto* en 1985, kaj kunredaktis ĝin ĝis sia subita forpaso en 2009. Kun ŝia nomo estas ligita la evoluo de *La Gazeto* al unike varia, altnivela, kultura revuo. Ŝi, ĉiam kun sia edzo *Eŭgeno de Zilah*, ekde 1988 organizis "*internaciajn konferencojn*", en kiuj, ekde 1990, ĉiujare, aŭtoro estis premiita pro elstara libro nefikcia en Esperanto.

La Gazeto plu aperas, nun sub la redakto de Eŭgeno de Zilah (kun Ed Borsboom, K. Jakobo kaj Paola de Zilah).



La tuta *33-a Esperantologia Konferenco*, kiu okazis en Havano, estos baldau spektebla en la *Reta Kinejo*. Jam enretigitaj estas:

Vilmos Benczik: "*La Esperanta literaturo tra la lupeo de kelkaj lingvoteorioj kaj literaturkonceptoj*" + diskuto

<http://www.ipernity.com/doc/97850/8859134>

Humphrey Tonkin: "*Organizaj strukturoj kaj la estonteco de Esperanto*"


<http://www.ipernity.com/doc/97850/8864397>

Diskuto pri la prelego de Tonkin:

<http://www.ipernity.com/doc/97850/8866325>

Krome tri aliaj prelegoj, estos baldau enretigitaj. Sekvu ĉe:

<http://www.ipernity.com/doc/97850/home/video>



===== Alilandaj legant(in)oj kontribuas ! =====

Nia samcelanino kaj amikino Julia, el Budapesto, esperantigis kelkajn citaĵojn el dulingva libro (bulgara / angla). Pluraj el ili famiĝis en la tuta mondo ...

Titolo de la libro : Stop the World ! I Want to Get Off.
Stopu la mondon ! Mi volas eliĝi.

Eble mi havas bonŝancon, ke mi paŝadas tiel malrapide, ĉar povas esti, ke mi iros al malbona direkto.
Asleigh Brilliant, usona verkisto

La situacio estas senespera, sed ne grava.

O.J. Flanagan, irlanda politikisto

La Tero estas la psikiatria azilo de la Sunsistemo.

Samuel Parkes Cadman, usona ekleziulo, verkisto

La misfortuno de la mondo estas tio, ke la stultoj kredas sin tutcertaj en ĉiu ago, kaj la saĝuloj estas plenaj je duboj.

Bertrand Russell , angla filozofo

Diplomato estas tiu persono , kiu povas forsendi vin al diablo tiel, ke vi preskaŭ atendus, ke vi povu tuj ekiri.

Caskie Stinnet, usona verkisto

Kun skizofrenio vi neniam estas sola.

anonimo

Hipokondrio estas la unika malsano pro kiu mi ne suferas.

anonimo

La besto... Kiel strangaj estaĵoj ili estas. La hundo suprenrigardas al vi. La kato malsuprenrigardas al vi. Nur en la okuloj de la porko vi estas samranga.

La historio notos ĝin. Mi scias, ĉar mi mem enskribos ĝin.

Estas tre utile por senkultura homo legadi citaĵo-kolektojn.

Sir W. Churchill, brita politikisto

La ideo ne respondecas pri tiuj, kiuj kredas je ĝi.

Don Marquis, usona humoristo

Se mi ekhavas emon labori mi sidiĝas en iun mallaŭtan angulon, kaj atendas ĝis kiam tiu ĉi sento ĉesos.

anonimo


Ĉiu generacio iamagas sin pli inteligenta ol siaj prauloj, kaj pli saĝa ol sia idaro.

George Orwell, angla verkisto

Se mi estus sciinta, ke mi vivos tiel longe, mi pli bone zorgus pri mi...

... diris Eubie Blake , usona ĵaz-muzikisto je sia 100-a naskiĝotago ... Unu semajnon poste li mortis.

Esperantigis : Julia Humana





Nova esperantista partio prioritatas la mondon antaŭ Eŭropo

La nova partio **Unu Mondo**, ĵus fondita de esperantistoj en Germanio, strebas partopreni en regionaj elektoj en Germanio en 2013, kaj en *la elekto de la Eŭropa Parlamento en 2014*. Pluraj el la fondintoj transiris al la nova partio el la pli malnova esperantista partio *EDE, Eŭropo-Demokratio-Esperanto*. Dum *EDE* koncentriĝis al agado en Eŭropo, la nova partio volas agadi mondscale. *"Nia unua vicprezidanto Fabian Elleder estas neesperantisto, kiu entuziasmiĝis pri nia afero ĉefe pro nia mondfederisma sinteno. Tio estas kuraĝiga signo, dum laŭ mia impresado EDE finfine restis fermita en si mem, almenaŭ en Germanio"*, rakontas Ulrich Matthias, unu el la fondintoj, en intervjuo de *Libera Folio*.

... / ...

En kiuj landoj ĝi intencas aktivi, en kiaj elektoj partopreni?

Nia partio jam havas subtenantojn inter esperantistoj en ĉ. 20 landoj. Relative forta estas la interesiĝo en Brazilo kaj Afriko. Kompreneble ne facilas fondi partion, sed mi esperas, ke plej malfrue post kiam ni partoprenos en germanaj balotoj kun ne tro mizera rezulto, tio kuraĝigos ankaŭ alilandanojn fondi sekcion de *Unu Mondo* en sia lando.

Ni planas tre konkrete, ke ni partoprenos en la balotoj de la germana federacia lando Hesio en 2013 kaj - almenaŭ en Germanio - en la eŭropaj balotoj en 2014. Por la unua el tiuj ĉi balotoj, ni devos kolekti 1.000 subtenajn subskribojn inter 4,5 milionoj da homoj kun voĉdonrajto; tio ŝajnas esti atingebla. Rilate al partopreno en eŭropaj balotoj, *EDE* jam montris, ke tio povas esti realigebla. Bonŝance inter niaj fondintoj estas ankaŭ 4 el la 10 germanaj kandidatoj de *EDE* el la Eŭropaj Balotoj de 2009.

Kiel Unu Mondo diferencas de la partio Eŭropo-Demokratio-Esperanto?

EDE deziras fortigi demokration kaj liberecon en Eŭropo, dum *Unu Mondo* pli emfazas la gravecon de etiko kaj respondeco por plibonigi la mondon. Ekzemple rilate al la financa krizo, *EDE* substrekis la gravecon de demokratia kontrolo de la financaj merkatoj, dum *Unu Mondo* preferas subteni moninvestadon laŭ etikaj principoj (kaj sekve decidis ankaŭ mem malfermi konton ĉe speciala banko, kiu agas laŭ tiaj principoj). *Unu Mondo* tre forte interesiĝas pri la jarmilaj evoluigaj celoj de UN (pri kiuj oni ofte diras, ke simple pro manko de politika volo ili antaŭvideble ne estos atingataj).

Ni profunde okupiĝas pri konceptoj kiel ekologi-sociala merkata ekonomio kaj solidara ekonomio, dum por *EDE* tio estas nur flankaj aferoj, pri kio oni ĝis nun hezitis publikigi ion. En la praktiko, *EDE* koncentriĝas je lingvopolitiko kaj - ĉar tiu temo ne estas aparte populara - apenaŭ trovas subtenon ekster la Esperanto-movado. *Unu Mondo* intense serĉas kontaktojn al neesperantistaj movadoj. Ekzemple unu el niaj estraranoj kunvivigis lokan grupon de la iniciativo *Tutmonda Marshall-Plano*, kaj mi mem post nelonge reprezentos nian partion en konferenceto pri internacia senŝuldigo.

Nia unua vicprezidanto *Fabian Elleder* estas neesperantisto, kiu entuziasmiĝis pri nia afero ĉefe pro nia mondfederisma sinteno. Tio estas kuraĝiga signo, dum laŭ mia impresado *EDE* finfine restis fermita en si mem, almenaŭ en Germanio. *EDE* ja povas utili kiel varbagentejo por Esperanto, sed certe ne havas ŝancon fariĝi serioza politika forto.

Kiu estas la sinteno de la nova partio al Esperanto?

Evidente *Unu Mondo* forte inspiriĝis de la humanismaj ideoj de Zamenhof. La lingvo bone taŭgas por progresigi kompreniĝon kaj egalrajtan kunlaboron tutmonde, kaj samtempe faciligas al homoj senti sin mondcivitanoj. Ni preferas strategion de etaj paŝoj. Plej gravas por ni daŭre atentigi pri tio, ke Esperanto estas vivanta kaj utila lingvo. Pri konkretaj postuloj ni decidis laŭokaze, konsciante pri tio, ke proponoj kiel *"la instancoj de EU aŭ UN enkonduku Esperanton"* certe ne tuj trovas abundan entuziasman subtenon en la "ekstera mondo". Por *Unu Mondo* gravas rigardi Esperanton simple kiel unu eblan helpilon favore al mondo pli paca, pli justa kaj pli humana - kaj forte interesiĝi ankaŭ pri aliaj paŝoj tiudirekten.

Sub la pluvo..

Pluvas, pluegas kvazaŭ la naturo plorus pro iu nekonata kaŭzo. De mia skribotablo situanta apud la fenestro plej proksima al la strato facilas vidi kiel senĉese kaj torente la akvo vundas la pavimon. Homoj rapidpaŝas serĉante rifuĝon sub la tegmentoj kaj la pluvo kaskadas impete, ili babiladas inter si. Ankoraŭ mi ne povas kompreni kial la pluvo igas ilin komunikemaj. Nu, certagrade ankaŭ mi emas al komuniĝo dum tiaj okazoj. Stranga afero!

Kia estas la pluvo en Kubo? Certe ne tiom malvarma, kiel en niaj regionoj. Kun tiaj pensoj vi povos ĝui la noveleton de Juan Lázaro Besada Toledo el Kubo.

Aŭtoj trairas la larĝan avenuon lante, ĉar la malsekiĝanta pavimo ne helpas al ŝoforoj akceli la motorojn. Ŝajnas ke la pluvo efikas kiel bremsilo super ĉiuj kaj ĉio. Bone, almenaŭ dumpluve hasto ne premas nin.

Subite aperas antaŭ miaj okuloj bildo preskaŭ neimagebla. Homo promenas laŭlonge de la avenuo trankvilpaŝe kaj kun feliĉa mieno sub la pluvo, spite al la akvo kiu malsekiĝas lin. Mi ne povas rezisti la tenton rigardadi lin, ĉar tio estas tiom nekutima ago, ke mia cerbo streĉiĝas klopodante kompreni kial tiu homo defias la naturon. Kial? Ĉiam la eterna demando. Ni ne povas vivi sen demandado pri la kialo de ĉio ajn. Ĉie okazas la samo kaj ni ĉiam alstrebas respondi tiun demandon, kvankam preskaŭ neniam la respondo trafas nin. La subpluva promenanto aspektas sana kaj feliĉa. Lia vizaĝo montras tre sinceran rideton, kies plaĉa aspekto atestas pri tiu interna ĝojo kiun ne necesas konfesi. Lia tuta korpo esprimas ĝojon pri kiu ne eblas dubi. Sed, kial li ĝuas dum la pluvego trakuras lian korpon kvazaŭ vipkareso? Ambaŭ-flanke de la avenuo multaj florarboj renaskiĝas kaj la herbo hele verdas. La bunteco de tiuj floroj, iliaj parfumoj atingas min tra la fenestro kaj vekas ĉe mi belajn revojn, plenajn de amo kaj espero, de sincero kaj trankvilo. Dume, li promenas kaj alproksimiĝas al la florarboj. Li staras antaŭ ili silente kaj mediteme. Mi ne scias ĉu floroj ensorĉas lin, sed li rigardas ilin kun gaja mieno, kvazaŭ la floroj estus trezoro delonge serĉata.

La pluvo iom post iom ĉesas. Denove la suno komencas dissendi helajn lumradiojn kaj ĉio normaliĝas. La homoj forlasas la lokojn kien ili rifuĝis kaj daŭrigas la marŝon, la veturiloj haste kaj brue trakuras la avenuon kaj la papilioj kouras la ĉielon. Iliaj disaj flugoj alportas plian kolor-riĉon al la naturo. Tamen, je mia miro, ĝuste nun kiam ĉiuj kaj ĉio reviviĝas pro la pluvoĉeso kaj la vivo reakiras sian normalan pulson, la promenanto kaŭras sur la tero, detranĉas florbutonon, flaras ĝin kaj rigardante la serenajn ĉielon en kies alto la suno salutas la tutan naturon, li, kiu antaŭe tre feliĉe aspektis... ekploras!

de Juan Lázaro Besada Toledo



Ça va mieux en le disant !

« [.../...] Il est enfin faux de présenter l'espéranto comme un projet de langue mondiale susceptible de remplacer les langues naturelles pour unifier l'humanité. Le but de l'espéranto est au contraire de **protéger la diversité des langues** en offrant un instrument de communication accessoire qui soustrait à la tentation de parler, dans les seules situations internationales, la langue du plus fort au détriment de celle du plus faible. C'est pour défendre l'égalité des cultures et

préservier leur existence que Zamenhof a inventé l'espéranto, certainement pas pour le substituer aux langues naturelles. L'espéranto est **une langue auxiliaire** et non **une langue principale**. Il suffit de lire l'œuvre de Zamenhof lui-même – *Essence et avenir de la langue internationale* (1900) par exemple – ou simplement la résolution de l'Unesco du 8 novembre 1985 sur l'espéranto, pour dissiper toute équivoque sur ce point. Le reste n'est que contresens »

François Viangalli, maître de conférences à l'université de Grenoble II

(NB – en réaction à un article de M. Onfray sur les langues régionales et l'espéranto)

Kontribuis al ellaborado de la bulteno (alfabeto ordo)

M. Basso – Cyril / Roz' – P. Denis – J. Fülöp – L. Gabalda – A. Grossmann – A. Kadar – E. Ludwig – G. Martin – U. Mathias – H.D. Platz – M. Preciozo – SAT-Amikaro – B. Schumann – J.L. Thibias – J.L.B. Toledo

... Jen ni en Usono ! ...

Miraklo de la moderna teknologio, pro la horŝanĝo, la flugvojaĝo faris nin plijuniĝi je unu tago. Ni alvenas en Ameriko antaŭ ol ni foriris de Oceanio..

Ĉar ni iomete pritimas la malvarmecon en tiu fruaprilo, ni rezignas pri nia projekto iri al Kanado kaj rekte flugas al Usono, pli precize al Kalifornio, kie la knabinoj ruliŝas laŭ la plaĝo kun plej eta ŝorto kaj la bele sunbrunigitaj surfantoj jarlonge glitfloras sur la ondoj, almenaŭ en la televidaj felietonoj. Sed la realeco iomete malsamas. Jam de nia alveno en San-Francisco malvarmas kaj pluvas. Pli sude, ni laŭbiciklos plaĝojn kie amasas fokoj profitantaj de la malforta suno printempa.

Ni ekvizitas San-Franciskon per la famaj *Cable cars*, la kablotramoj, kiuj grimpas sur la tre deklivaj stratoj de la urbo. Ili kondukas nin ĝis la enŝipejo al Alkatrazo, malgajaspekta malliberejo staranta sur rokego meze de la malvarmega akvo de la San-Franciska golfo. Por viziti ĝin, necesas anticipi aĉeti bileton kaj prezenti sian pasporton. Ŝajnas ke, hodiaŭ, same malfacilas eniri ĝin ol antaŭe eliri. Temas pri "ĉarma" loko kun unu-personaj ĉeloj tiom malgrandaj ke ili pensigas je ŝuskatoloj kaj en kiuj agrablas ne tranokti. Ni fakte pli komfortas ĉe Brian, biciklisto, kiu ĵus revenas post kuŝbicikla rondvojaĝo laŭ la usonaj landlimoj. Entute, estis pli da kilometroj ol ni mem realigis ĝis nun kaj en duono da tempo.

Post SF, por la unua fojo ekde la vojaĝkomenco, antaŭ unu jaro, ni devas dormi en oficialaj tendumejoj, ĉar je iu flanko de la vojo etendiĝas la oceano, kaj je la alia staras la montaro. Kiam ebena loko troveblas inter ili, estis kreita ŝtata parko, plej ofte kun kampadejo malpli kosta ol la privataj.

Ankaŭ en Usono ni unuafoje dormas en junularaj gastejoj pro la oftaj fortaj pluvoj, kiuj inundas la tendumejojn. Tio kompreneble faras nin multe elspezi. En Usono ĉio multekostas kaj ĉio pagendas.

Sed ni rapide adaptiĝas al la kapitalisma sistemo. Ĉiu superbazaro proponas senpagan abonkarton de la vendejo, kiu donas rabatojn. Ni prenas iun en ĉiu nova superbazaro kaj ni tiele akiras ĝis 30-procentan rabaton ĉe la kasejo.

En Holivudo, unuavice gastigas nin aktorino de la 1960-aj jaroj, Lisa Baugher, kiu ludis en filmoj interalie kun Marilyn Monroe, kaj ŝia edzo Ted, franco elpatriiĝinta dun sia adolesko kiu laboris en filmproduktado. Danke al ili, ni malkovras Holivudo-bulvardon kaj ties surtrotuarajn stelojn pri famuloj, sekve la gigantajn literojn HOLLYWOOD kaj la luksan kvartalon de Beverly Hills, ekvivalenta al la pariza avenuo de la Elizeaj Kampoj.

Kelkajn tagojn poste, ni vizitas Judith-on, turistinon, kiun ni hazarde renkontis... en Turkio. Ŝi tiam ofertis gastigadon se ni iam trapasus Holivudon; ni nun profitas ŝian proponon. Tie, ni vizitas la studiojn Universal, kiuj iomete elrevigas nin, des pli ke la enirprezo altas. Ni antaŭvidas kinajn studiojn sed ni trovas precipe amuzparkon iomete eksmodan, kies amuziloj iel similas tiujn troveblajn en kermesoj. Tamen estas bonaĵo, nome la promeno per turismtrajneto tra la studioj kaj kinaj artifektoj, kiaj la tertremo en metrostacio kaj la inundo en meksika vilaĝo, kiel oni privivus la aferon.

Nia vojaĝo finiĝas laŭ la Pacifika Oceano tra San-Diego, kie gastigas nin amiko de Judith, David, amanto de Francio, kiu celas tie loĝi post la emeritiĝo kaj kiu parolas la francan pli bone ol ni! Ni alvenas dum la meksika festo de la 5-a de majo, kiu memorigas la meksikan venkon kontraŭ la franca okupacio pere de la aŭstria imperiestro Maksimiliano.

Plej surprizis nin la dulingveco en Kalifornio. Videblas multaj skribaĵoj en la angla kaj en la hispana, inkluzive en publikaj lokoj kiel la metroo, la vendejoj kaj sur reklamaj afiŝoj. Tiu dukultureco plaĉas al ni.

Plie, laŭlonge de nia itinero, ni renkontis esperantistojn. Unuavice en San-Francisko, kie paro el Fremont, Henrique kaj lia edzino, malkovrigis al ni parkon de grandegaj sekvojoj je la alia flanko de la *Golden bridge*, la fama ruĝa pendponto de San-Francisko, kaj donacis al ni privojajn mapojn. Ankaŭ invitis nin la lokaj kluboj por manĝi picon en San-Francisko kaj Santa Barbara. En San-Diego, Marta donacis al ni aliajn mapojn, ĉi-foje de Meksiko. Kaj la esperantistoj igis nin rilati kun gastigontoj en Gvadalaharo kaj Meksikurbo. Estas komferte paroli alian lingvon ol la anglan aŭ la hispanan kaj, precipe, estas pli facile por komuniki kiam ne iu el la parolantoj havas la avantaĝon uzi sian gepatran lingvon. ..

Ec biciklede la tempo fulme forflugas !
Jen raporto de niaj du vagabondoj, kiu atingis la ret-skatolon ! a 4an de septembro !

Hodiaŭ, la 15a., alvenis en la stratskatolon postkarto el Costa-Rica !

Supozeble multaj ret-anoj subtenas tiun iom aŭdacan entreprenon, kaj ricevas regulan reportajon kun abundaj fotoj kaj vidobendoj !

Bonan kuragon al Cyril kaj Roz !





El nia libroservo



Nove alvenintaj libroj



1



2




3

1) **Esperanto kaj mi**, Eseoj, **Opo**, *Horizonto* (2007), 208 paĝoj, **12,90 €**.
Eseoj pri esperanto de 180 esperantistoj el 17 aziaj landoj.

2) **Raportoj pri la invitprojekto**, Movado, **Opo**, *Japana Esperanto Instituto* (2007)
72 paĝoj. **4,800 €**. Raportoj de 20 invititoj el Azio al la 92a Universala Kongreso en Jokohamo.

3) **La Eta Princo**, Fabelo **Saint Exupery**, *K.E.A. / Esperanto France*. (2010), 98 p, **12,00 €**. Reeldono de la famega verko de Saint Exupéry. Fabelo pri infana princo veninta el eta planedo al Tero kaj renkontanta tie aviadiston paneinta en dezerto...

Resumoj, recenzoj, opinioj...



Bildoj pri Norda lando kaj aliaj rakontoj Memorajoj kaj rakontoj 360 p, **Sen Rodin, F.E.L. 24,00 €**

La itala aŭtoro Sen RODIN (pseŭdonimo de Filippo Francheschi) jam publikigis kelkajn tekstojn en diversaj revuoj. Tuta kolekto aperis ĉe FEL sub la titolo **Bildoj pri Norda lando kaj aliaj rakontoj**. Oni kutimas diri, ke esperantistoj interesiĝas pri la ĉiutaga vivo de homoj diverslandaj. Se tio kongruas kun via maniero vivi Esperanton, ne hezitu legi tiujn rakontojn/priskribojn en belega lingvo: enamiĝinta italo rakontas pri portempa vivsperto en Svedio kaj pri sia junaĝo en Italio. Ege leginda libro! **E.L.**

Por mendi librojn :

1. Vi sendas vian mendon

- per poŝte (la plej sekure) al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDOEUVRE (uzante la ĉisuban mendilon)

- per e-poŝto al «libroservo.efe@wanadoo.fr»

- nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.

2. Vi baldaŭ ricevas viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj)

3. Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al «**libroservo 2800-76 H NANCY**» (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo «libroservo» sendita al la adreso de la libroservo.

Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al «**LIBROSERVO**» IBAN : FR 98 20041 01010 0280076H031 97 BIC :

PSSTFRPPNCY., indikante en la koresponda linio la numeron de la fakturo

Mendilo

Bonvolu sendi tiujn librojn:

al jena adreso:

-
-
-
-

S-ro/ino

-
-

En

la

Subskribo:



Iu virino eniras la koncerto-salonon, dum la orkestro ludas la « *pastoralan simfonion* ».

Certagrade konfuzita ŝi duonlaŭte informiĝas ĉe sia najbaro :
 « Pri kiu muzikpeco temas ?
 - Ni ĝuas *la sesan simfonion* de Beethoven ...
 - *La sesan* ? Nekredeble, mi neniam pensintus, ke mi tiom malfruas ! ».

☆☆☆

« Mi vere tute sembioze vivas kun mia frato... Ni ja estas ĝemeloj. Se mi malvarmumas, mi ternas... Se li tro rapide kuras, mi spertas spiromalfacilaĵojn... Se li tro trinkas, mi ebruiĝas ! Antaŭnelonge mi finfine trafis « la virinon de mia vivo » ...
 - Nu, kaj ? ...
 - Li edziĝis kun ŝi ! ».

☆☆☆

Dum « staĝo » en kazino, iu junulo ricevas pafilon kun uzmodon.
 « Vi iĝas gardisto ĉi-tie. Se iu alproksimiĝas vi krias « *Kiu vi ?* » ... Kaze de nenia respondo vi krias « *Haltu tuj* » ... Se daŭras la silento, vi pafas ! ».
 Iom pli malfrue, la juna staĝano aŭdas paŝojn... Li ekkrias « *Kiu vi* » ? kaj « *Haltu tuj !* »...
 Tiam aŭdiĝas laŭta, timoplena voĉo...
 « Nu, stultulo, ne pafu ! Mi alportas al vi kartoĉojn ! ».

☆☆☆

Junulo fiere alparolas amikinojn...
 « Okulumu, karulino ! Jen mia tutmoderna brakhorloĝo ... ĝi indikas la nordan direkton kaj sango-premon ... Se vi premas tiun butonon, vi estas informita pri via pezo. Tiu alia butono ebligas aŭskulti radion kaj tiu sube registradon...
 - Nu, sed, sed ... ĝi ŝajne ne indikas horojn !
 - Hem, ne, prave ... sed tio estas plusaĵo laŭdezire ».

☆☆☆

Du deĵorantaj policistoj sur aŭtovojo vidas aŭtomobilon, kiu akcelas, dum ĝi preterveturas antaŭ ili ... Ili tamen sukcesas haltigi ĝin kaj konstatas, ke ĉe la stirilo sidas maljuna viro.
 « Ĉu vi konscias pri via danĝera konduto ? Vi ja grave superas la leĝan rapidecon ! Nenia motivo por pravigi tion !
 - Nu, jes ja, sinjoro policisto... Imagu ke antaŭ 20 jaroj mia edzino forlasis min por fuĝi kun ĝendarmo ... Kiam mi vidis, ke vi sekvis min, mi pensis, ke unu el vi estis la kulpulo, kiu deziris reĥejmigi la edzinon ! ».

☆☆☆

« Bone, informas kirurgisto post aŭskultumado de iu paciento... morgaŭ mi operacios, sed jen plia demando : ĉar tio estas komplika kaj multekosta, mi deziras scii, ĉu via vidvino kapablos pagi la fakturon ! ».

☆☆☆

En lernejo, iu knabo informiĝas je kamarado...
 « Mirige ! Kiamaniere vi memorigas tiom da nedecajn vortojn ?
 - Facile ! Mi konektas la magnetofonon, kiam mia patro intencas ripari ion en la hejmo ! ».

Paciento pretas forlasi la kuracejon, en kiu oni prizorgas mensajn problemojn. Antaŭ foriri li dezias danki la fakulon, kiu sukcesis resanigi lin...
 « Nu, sinjoro, vi nun ja perfekte sanas... Vi ne plu kredas, ke vi estas ankoraŭ Napoleono !
 - Prave, estimata Doktoro, tion mi ja ŝuldas al vi. Sed lasta demando... Por ĝui mian baldaŭan emerito-tempon, kia insulo plej taŭgas ?... *Elbo* aŭ *Sankta Helena* ? .. »

☆☆☆

Iu ministro rakontas...
 « Kiel donaco por la nova jaro, nia ĉefministro jus donacis al ĉiuj membroj de la registaro superban kalendaron kun okultrafajn fotojn
 - Nu, jen originala ideo... Vi certe aprezis !
 - Hem, ne tute... Mi konstatas, ke mia propra kalendaro indikas nur la tri unuaj monatojn !... »

☆☆☆

Iu provoso, kiu gastis hejme dum la semajnfino, revenas lundon matene al la malliberejo por la kutima deĵorado.
 « Cu vi jam aŭdis ?... pridemandas kolego, la malliberulo 14 fuĝis !
 - Bonege ! Mi vere ne plu kapablis elteni la knaradon de lia fajfilo kontraŭ la fera krado de la ĉel-fenestreto !... »

☆☆☆

La edzo diligente pedalas jam de unu horo sur la hejmo-bicikledo.
 La edzino alproksimiĝas kaj petas informon:
 « Karulo, mi dezirus ekkuiiri la biftekojn...
 Nu, proksimume, kiom da kilometroj restas antaŭ ol ci atingu la domon ? ».

☆☆☆

Oni sonoras... unufoje, dufoje, trifoje ... Finfine Julieta malfermas la pordon kaj ekvidas du policistojn...
 « Vere, vi ne kapablis alveni pli rapide ?
 - Senkulpigon, sed mi pianumis... Pri kio temas ?
 - Oni ĵus telefonis al la policejo, ke en via domo oni murdantas Mozarton ! »

☆☆☆

Maria, tre juna knabineto kaptas la telefonon kaj vokas la lernejon:
 « Bonan tagon, sinjoro Direktoro, mi estas la patrino de Maria. Ŝi ne povos viziti la lernejon hodiaŭ, ŝi malsanas ...
 - Nu, eksklamas la skeptika aŭskultanto, ĉu vere vi estas la atrino de Maria ?
 - Memevidente, sinjoro Direktoro, mi ja estas mia patrino ! ».

ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2011 ĝis 2013

Nova kotizo: Nia asocio **Esperanto France-Est** havas la rajton atesti pri ricevitaĵoj aŭ kotizoj, dekalkuleblaj de la impostoj. La principo estas, ke eblas dekalkuli de la impostoj 66% de donaco aŭ kotizo al nia asocio. Tial ni povas proponi al vi kotizon je 20 eŭroj el kiuj 66% povas esti dekalkulitaj de viaj impostoj. Tiam entute vi estos paginta $20 - 66\% = 6,80$ eŭroj, sed nia asocio estos tamen ricevinta 20 eŭrojn. Se vi pagas tian kotizon aŭ pli, nia kasisto sendos al vi ateston, kiun vi povos aldoni al via imposto deklaro.

La atestoj rilatas al pagoj ricevitaĵoj en 2010 (principe ĝis la 31a de decembro) por la imposto-deklaro de 2011.

Bonvolu trovi ĉi-poste la tarifojn por la venontaj 3 jaroj. Ni proponas al vi jam nun, antaŭ la fino de 2010, pagi vian abonon al **La Informilo** laŭ la ĉi-suba tarifo. Krome vi povas elekti inter la 2 membro-kotizoj por nia asocio, laŭ via situacio rilate al impostoj.

Jaroj:	2011	2012	2013
Abono por adresoj en Francio:	14 eŭroj	14 eŭroj	14 eŭroj
Abono por adresoj ekster Francio:	18 eŭroj	18 eŭroj	18 eŭroj
Federacia kotizo:	7 eŭroj	7 eŭroj	7 eŭroj
Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj	20 eŭroj	20 eŭroj	20 eŭroj

Pagmanieroj	<p>1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio: <u>Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY</u> Ne forgesu koncize mencii la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto: ekzemple: abono Informilo + kotizo 2011 por 1208</p>
	<p>2. Per bankĉeko aŭ poŝtĉeko je la nomo de: <u>Esperanto France-Est</u> sendita al jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al ktp por 2011, 2012 ktp. Se necese menciu vian adres-ŝanĝon aŭ adres-korekton.</p>
	<p>3. Por Germanio al nia peranto: Poŝtĝirokonto: 918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA Ludwigshafen, je la nomo de: Hans-Dieter Platz. (menciu la celon de via pago)</p>
	<p>4. Per internacia ĝiro je la nomo de <u>Esperanto France-Est</u> kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY (Ne forgesu mencii la celon de via pago kaj vian adreskodon)</p>


Abonoj

JARKOLEKTO de TAKE	6 eŭroj	Ĉiu-jare TAKE eldonas teknikan kajeron kun pluraj fakaj artikoloj de diversaj aŭtoroj.
Juna Amiko	14 eŭroj	3 numeroj jare kun allogaj legaĵoj en simpla lingvaĵo por lernejoj kaj komencantoj.
Internacia Pedagogia Revuo	18 eŭroj	4 numeroj jare. IPR prezentas instru-fakajn artikolojn, edukajn novaĵojn, recenzojn de lernolibroj kaj de alispecaj lerno-materialoj, organizajn informojn.
Scienca Revuo	20 eŭroj	4 numeroj jare. Oficiala organo de Scienca Asocio Esperantista kun originalaj artikoloj de diversaj aŭtoroj, leteroj de legantoj kaj scienca eŭo.

Niaj retejoj	http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr/ http://esperanto.france.est.free.fr/historio.htm	
Nia dissendolisto	Por sendi mesaĝon:	Alzaco-Loreno@yahooogroupes.fr
	Por enskribiĝi:	Alzaco-Loreno-abonnement@yahooogroupes.fr



Dankon al nia samideano Joël GRANDJEAN, kiu verkis tiun novan krucvortenigmon



HORIZONTALE

1. Pasinta fakt'.
2. Zodiaka sign'.
3. Gras'. Nigra karbona substanc'.
4. Part' de la buŝo. Kolora likv' por desegni k skribi.
5. Doktrin' pri la evoluo de la vivuloj. Prepozicio.
6. INVERSE: eljeti tra la buŝo. Prepozicio uzata en kernio.
7. Malgranda ronĝui' konata pro amasmigradoj. Pro iu kozo.
8. Specialist' pri politika sistemo.
9. Parto de la homkorpo. Malgrand'.
10. Vehikla lingvo originata el la angla k la ĉina.
11. Pronomo. INVERSE: strebos.
12. Konjunkcio. Granda birdo vivanta en dezertoj.
13. Rapidis piede.
14. INVERSE: kohera rezonado.
15. En iu loko de elnombro. Supra part' de la homkorpo.
16. Sufikso. Ludil' kun 2 malgrandaj radoj.
17. Diletant'. Respektplen' al Dio.
18. Stat' de horizontala ebena. "Kotopo".

VERTIKALE

1. Aŭtoro de hebrea kantiko. An' de okupita teritorio.
2. Radioaktiva element'. Denta instrument' por skrapri la teron. Blanka brila metalo.
3. Scienco de antikva civilizacio. Rilativo. Patr' de patro.
4. Antikva kolon'. Mezum'. Propone kiel hipotezono.
5. Ne grand'. Integra cirkvit'. Ano de ŝtata registoro. Part' de la korpo.
6. Malgranda krustaco. Belfrid'.
7. Mediteranea herb' kultivata por oleoriĉaj spicaj semoj. Religia ceremoni'. INVERSE: astro. Sufikso esprimanta pasivon.
8. Afrika river'. Malgranda. Sufikso. Subtera ĉambr' en preĝejo.
9. INVERSE: Afer', kies celo estas monprofito. Blanka pigment' el ziaka sulfido. Kartona foliet'.





mistera krado

Forprenu la literojn de la supra krado, vertikale alfabete ordigitaj, kaj sovu ilin en la malsupran kradon, je taŭga loko.

Tiam, vi malkovros citaĵon de Geluck.

1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
I	E	C	E	K	D	A	C	A	I	I	
L	G	E		N	E	E		C	N	T	E
P	I	G	N		I	E	S	I	S		L
P	L	I	O		O	N		O	T	U	S
T	R	N	O	S	T	S	T	S			



kiel pravas tiu okulfrapa desegnaĵo

distanco A - B estas dufoje pli longa birdfluge ol aŭtomobile

Tiu belga artisto, 56 jaraĝa, unue aktoro, rapide famiĝis pro la apero de bildostrioj, kies ĉefa « heroo », pli bone « anti-heroo » estas « La Kato », perfekta ekzemplo de antropomorfismo. Li ja vestiĝas kiel homo, staras sur du piedoj kaj adoptas sintenojn de homo, ekz stiri veturilon, viziti kafejon, ktp. La humuro de « La Kato » baziĝas sur vort-ludoj, foje ne tuj kompreneblaj kaj ofte absurdaj. Vidu supre ! ...



ni ne ploru pri la forfuĝanta tempo...

... tio estingas la kandelojn!



Solvo de la lasta " vertikala enigmo " (150)

hierau estas historio, morgau estas mistero, hodiau estas donaco



(Plouezec) stranga renkonto dum ekskurso ! – ĉiam allogas la maro
Ĝuinda evento dum la infan-kongreseto en Kubo
Alex intervjuas ĉe la internacia ekspozicio en Ŝanhajo !
Antaŭ la farandalo en la staĝejo